

BULGARA ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



10-1980



La prezidantaro de la packunveno en Sofio
(vd. paĝon 6)



E-istoj el la societo „Georgi Stanev“ en Orŝovo
laborbrigadis sur insulo Esperanto en Danubo.
Organizanto Nadja Bosaška (dekstre, la unua).

ENHAVO

Nikola Aleksiev. Ĉiuj vojoj de la paco kondukas al Sofio	1
* * Alvoko de la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco	3
* * Sofio — Urbo de la Paco	3
Georgi Markovski. Ni el la lasta kvarono de la XX jarcento	4
* Asembleo „Standardo de la Paco“ — renkontigo „Sofio — 80“	5
* Granda packunveno en Sofio	6
* Deklaro de la packunveno en Sofio	6
K. V. La Internaciaj Kursoj de E-Instruistoj	6
K. Bjandov. Ni intensigu nian propagandon!	7
S. C. Nova E-societo	7
Anton Antonov. Bona postkongresa paŝo	7
V. Dokova. Renkontigo de E-generacioj	8
Dobrinka Ĉernogorska. Junulara ekskurso tra Pirin-montaro	8
Pavel Harlov. Kiel Esperanto helpis min	8
Evgeni Georgiev. La 36a Internacia Junulara Kongreso de TEJO	9
* * Pago dediĉita al Finnlando	10
R. Eichler. Reĥoj de la 40a kongreso de BEA	10
Prof. Velizar Velkov. Antaŭ la memorinda 681 Aleksandro Vutimski. Bulgario. Traduko de Prodan Prodanov	12
Radka Lazarova. Al mia estonta filo	12
Todor Soŝev. Du solecaj koroj	12
Šišman Bočev. Reveno el la transa mondo	13
H. Трендафилова. Примерът (успореден текст)	15
Nadja Trendafilova. La ekzemplo (paralela teksto)	15
* * La 40a kongreso de BEA en la gazetaro	16
* * Deziras korespondi	16
I. Oljanova. En la ĉi-jara infana kongrezeto	111
* * Cu vi havas bonan prispacan imagon?	IV

Sur la kovrilpaĝo:

Romeŝ Ĉandra — prezidanto de la Monda Packonsilio, ĉe la tribuno de la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco kaj la prezidio de la Parlamento dum la inaŭguro.

Redakta komitato:

Kunĉo VÁLEV (ĉefredaktoro), Vasil BOROVANSKI, Evgeni GEORGIEV, Dimitro DENČEV, Dimitro HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Haim LEVI (vicĉefredaktoro), Flori NIKOLOV.

Administranto: Metodj Garev

Korektis: Rajna Konstantinova

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-25

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919
Eldonkvanto 6100.

NIAJ PERANTOJ

Alfabeto laŭ landoj:

Britio. Covenham Louth, Lincs,
Laycroft Main Road, s-ro Paul Hewitt

Ĉeĥoslovakio. 040 01 Košice,
Šmerova 35/1, Esperantisto Slovaka,

Daniel Papak

Finnlando. PL 221. SF 70 101, Kuopio 10,

Finna Esperanto-librejo

Francio, 54042, Nancy Cedex

11 Cours Leopold, s-ro Roger Degrelle

Germana Demokratia Respubliko,

DDR 108 Berlin, Charlotten str. 60,

Centra Laborrondo Esperanto

Hispanio, Gijón Asturias, Ramon y Cial,
44-3° — Izqda, s-ro Adonis Gonzales Meana

Italio, 20052 Monza (Milano), c/o Romano Morelli,
via G. Cantore 8, Grupo Esperantista Monzese

Kubo, Habana 1, poŝtkesto 314,
Kuba Esperanto-Asocio

Mongolio, Ulan-Bator, poŝtkesto 733,
Mongola Esperanto-Asocio

Vjetnamio, Hanoi, 222 Dôl Càn,
Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio



MONDA PARLAMENTO DE LA POPOLOJ POR PACO

23—27 DE SEPTEMBRO, SOFIO

Ni ĉiuj kredas je la fina venko de la paco, de la kunlaboro kaj progreso. La paco estas kaj povas esti konservita! La milito devas kaj povas esti evitata! La termonuklea sinmortigo de la homaro devas kaj povas esti malebligita! Tiu ĉi certeco devenas ne nur el la malnova kiel la mondo homa kredo je la venko de la lumo kaj la bono super la mallumo kaj la malbono. Tiu ĉi certeco estas rezulto ankaŭ de sobra analizo de la proporcio de la fortoj kaj la faktoroj, kiuj estas por la paco, kaj tiuj, kiuj estas kontraŭ la paco.

TODOR JIVKOV

(el parolado ĉe la malfermo de la
Monda Pacparlamento de la Popoloj)

ĈIU VOJOJ DE LA PACO KONDUKAS AL SOFIO



La ĉefa kaŭzo estas la treege danĝera politiko de Usono kaj ties aliancanoj el la agresema bloko NATO, strebanta revenigi la homaron al la periodo de „malvarma milito“ por realigi superecon en la armado rilate al Sovetunio kaj la landoj de la Varsovia Pakto. Dum la lastaj du jaroj Usono malkaŝe sin preparas neniigi Sovetunion kaj la mondan komunismon per produktado de novtipaj nukleaj armiloj, kiujn oni instalos en la okcidenteŭropaj landoj. Por pravigi antaŭ la propra loĝantaro la elspezojn de centmiliardoj da dolaroj por nuklea armilaro, la usona prezidento Karter kaj liaj konsilistoj elpensis la „teorion“ pri „limigita nuklea milito“. El milita vidpunkto simila „teorio“ estas simpla trompo kaj plena absurdo. Tion bonege scias kiel Karter, tiel ankaŭ la usonaj milit-specialistoj, sed ili tute konscie trompas la popolojn, por finfine dormigi ilian kontraŭstaron al la politiko de nuklea katastrofo.

„Ĉiuj vojoj de la paco kondukas al Sofio...“ — tiuj vortoj apartenas al la mondfama prezidanto de la Monda Packonsilio Romeo Candra. Tiel trafe li karakterizis la strebon de pacamaj reprezentantoj de la popoloj el ĉiuj partoj de nia terglobo veni al Sofio por partopreni la laboron de la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco.

Kio provokis la kunvokon de tiu Monda Pacparlamento?

La Monda Parlamento de la Popoloj por Paco kolektigis nome por pridiskuti la formojn kaj metodojn pri senmaskigo de la malbonaŭguraj planoj de la usona kaj monda militarismo, por mobilizi ĉiujn pacamajn fortojn konservi la serenigon, realigi faktan malmaladon, savi la homaron de la milit-minaco.

En la laboro de tiu unika Monda Pacparlamento partoprenis 2260 delegitoj (aŭ kiel

ofte oni nomis ilin — deputitoj) — kaj gastoj el 134 landoj de ĉiuj kontinentoj kaj reprezentantoj de pli ol 100 internaciaj organizaĵoj. La Sofia pacforumo fariĝis vera esprimanto de la volo al paco de centmilionoj da ordinariaj homoj el ĉiuj anguloj de nia planedo. Ĝia agadprogramo, formulita en speciala Carto kaj direktita al la popoloj, al la registaroj kaj al ĉiuj adeptoj de internaciaj organizaĵoj, prezentas largan kaj tute realisman platformon, kies plena realigo garantias la pacon en monda skalo.

La Monda Pacparlamento en Sofio pruvis, ke la publika opinio estas potenca faktoro en la batalo por paco, kondiĉe ke ĉiuj pacamaj fortoj agos organizite kaj unuece. La premo de la organizita publika opinio povas ruinigi eĉ plej bombastajn militplanojn. La aventurismo de Usono ne povas esti gvida kaj konstanta tendenco en la monda evoluo. La homaro posedas sufiĉe da racio kaj rimedoj por ne permesi eksplodon de nuklea kataklismo.

Nun en ĉiuj landoj antaŭstaras grandega laboro por popularigo de la decidoj de la Monda Pacparlamento. La reakciaj amasinformiloj, kompreneble, malhelpas al tiu nobla agado, sed la pacfortoj scias kiamaniere konatigi al vastaj popolamasoj la veron pri la pacforumo en Sofio. La rapida kaj amasa mobilizado de novaj popoltavoloj, de elstaraj personoj, de landaj kaj internaciaj organizaĵoj kaj movadoj por realigo de la komune aprobitaj decidoj — jen la plej efika garantio pri malebligo de la malhumanaj manovroj kaj planoj de la usona kaj internacia militarismo. Por efektivigo de tiu decida por la homaro turniĝo de la mondaj eventoj nin entuziasmigis la jenaj vortoj el la Carto, unuanime voĉdonita en Sofio:

„La milito ne estas neevitebla. La paco povas esti konservata kaj firmigata.

Sed neniu lando, neniu popolo, neniu



— Salutojn el Sofio, sinjoro! ...

partio kaj neniu organizo povas realigi sola ĉi tiun celon. Nur per komuna batalo oni povas ĉesigi la krimajn komplotojn, kiuj minacas la mondan pacon. Alternativo ne ekzistas!

Feliĉe ankaŭ ni, la esperantistoj, ne mankis en la Monda Pacparlamento. Ni aparte ne estas decida faktoro en la pacbatalo, sed kune kun centoj da aliaj organizaĵoj kaj movadoj ni prezentas neneglektindan faktoron. Nur tiamaniere la esperantistoj povas kontribui al la fortikiĝo de la ĝenerala pacfronto.

Kvinmembra delegitaro de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) frunte kun la prezidanto d-ro Imre Pethes (Peteŝ) kaj la ĝenerala sekretario William Jilbert aktive partoprenis la tutan laboron de la sofia pacforumo.

Krom en la pleno la kvin esperantistaj deputitoj kunsidis en pluraj „rondaj tabloj“, „laborgrupoj“, specialaj „forumoj“, „internacia tribunalo“ — ĉiuj dediĉitaj al difinitaj kaj specifaj problemoj kaj temoj. La delegitaro de MEM digne reprezentis la mondan esperantistaron en tiu plej amasa movado de nia nuntempo — la internacia movado de la pacadeptoj.

Ni, la bulgaraj esperantistoj, estas plenaj de optimismo: la homaro per la decida agado de ĉiuj pacfortoj nepre venkos la frenezajn imperiisman politikon kaj certigos la konservon de la vivo, de la progreso kaj de la kulturo sur la tuta tero!

Ni estas fieraj, ke nia malgranda lando partoprenas la potencon familion de la socialisma ŝtataro, kies plej granda forto estas Sovetunio kun sia enorma morala kaj materiala bazo por sukcesa kontribuo al la batalo kontraŭ la imperiismaj provokoj. Nia batalo por paco ne estas senperspektiva, ĉar en tiu ĉi mondo ekzistas Moskvo!

NIKOLA ALEKSIEV

Heroo de la Socialisma Laboro,
Honora Prezidanto de MEM



ALVOKO

DE LA MONDA PARLAMENTO DE LA POPOLOJ POR PACO

La popoloj en la tuta mondo estas profunde maltrankviligitaj. La minaco de monda nuklea milito neniam ĝis nun estis tiel akra.

La kresko de la nuklea armilaro kaj la stokado de arsenaloj de la morto atingis nekreditan nivelon. La daŭrigo de tiu proceso starigas la homaron antaŭ la minaco esti nenigita.

La «nova nuklea strategio» estas insida trompo por la popoloj; oni provas ilin konvinki, ke estas ebla limigita aŭ loka nuklea milito sen transformiĝo en ĝeneralan nukleatan katastrofon. Ni objektas kategorie tiun dangan kaj malhumanan doktrinon!

La popoloj en la tuta mondo per abnegacia batalo sukcesis malhelpi en daŭro de pli ol tri jardekoj la eksplodon de monda milito kaj faris tiom da klopodoj en la batalo por sereniĝo; ili ne volas esti kunpuloj en tiuj projektoj. Ili insistas ĉesigi la kreskon de la armilaro, ĉesigi la tintadon de armitoj, ĉesigi la okazigon de agreso kaj milita ĉantaĝo, forigi

la minacon de nuklea milito.

Ni apelacias al la racio kaj sento pri respondeco de la politikaj kaj ŝtataj agantoj kaj, alvokas la registarojn:

Rifuza la novajn programojn de armado! Ĉesigu la produktadon de ĉiuj specoj de armiloj por amasa detruado — raketnukleaj, neŭtronaj, kemiaj kaj ĉiuj aliaj! Reduktu la armilajn rezervojn! Malpermesu la nukleajn armilojn! Traktadon! Alternativo ne ekzistas!

Ni turnas nin al ĉiuj, por kiuj la paco estas kara: Hodiaŭ ne sufiĉas esprimi maltrankvilon! Ne sufiĉas signali alarmon! La popoloj estas kapablaj defendi la pacon — kaj tio estas ties fundamenta rajto! Estas necese agi!

Ni flankenlasu ĉion, kio dividas nin! Ni unuigu en la batalo por forigo de la minaco de nuklea milito!

Nia voĉo sonu kun eksterordinara forto! Ni haltigu tiujn, kiuj provas ĵeti la mondon en abismon!

Aprobata de 2260 partoprenantoj en la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco el 134 landoj kaj 6. 100 internaciaj organizaĵoj.

24. 09. 1980, Sofio

— Ha, ĉu mi estas „limigita“?

SOFIO — URBO DE LA PACO

Laŭ decido de la Monda Packonsilio Sofio, la ĉefurbo de Popola Respubliko Bulgario, estis proklamita urbo de la Paco.

Anoncante tiun decidon la prezidanto de la Monda Packonsilio Romeŝ Candra diris:

— La honorigo de Sofio per tiu alta titolo estas grava evento en la vivo de la Monda Packonsilio. Tiu ĉi speciala distingo al la civitanoj de Sofio donigas pro tio, ke ili dum multaj jaroj estas inter la plej fervoraj pacbatalantoj, pro tio, ke ilia urbo estas ne nur ĉefurbo de Bulgario, sed ankaŭ loko, kie naskiĝis multaj paciniciativoj. Ĉi tie ĉiu sindone partoprenas la pacbatalon. Ni amas tiun ĉi urbon, ni amas tiujn, kiuj loĝas ĉi tie, ni amas tiujn, kiuj ankaŭ nun estas dommastroj de la plej reprezenta renkontiĝo de la pacamaj fortoj de la planedo.

S-ro Romeŝ Candra enmanigis specialan honordiplomon al la prezidanto de la Plenumkomitato de la Ĉefurba Popola Soveto Petro Mejdurečki. En sia respondo tiu lasta substrekkis, ke al la moto de la sofia blazono „Kreskas, sed ne maljuniĝas“ nun plenrajte povas aldoni la vortoj de Romeŝ Candra, ke „ĉiuj vojoj de la paco kondukas al Sofio“.

ĈU VI ANKORAŬ NE ABONIS «BULGARAN ESPERANTISTON»?

Rapida tuj fari tion pere de via E-societo aŭ per la poŝto (en la katalogo ĝia numero estas 0330). Ĉiu bulgara e-isto devas ricevi kaj legi nian asocian organon! Al tio nin devigas nia E-konscienco kaj la asocia disciplino.

„Bulgara Esperantisto“ havigas al vi varian kaloran materialon. Ĝi estas la plej malmultekosta E-periodaĵo (240 paĝojn por 2,90 levoj!) Honore al la XII kongreso de BKP kaj 1300-jariĝo de Bulgario ĉiu E-societo plenumu digne sian abonplanon!



NI EL LA LASTA KVARONO DE LA XX JARCENTO

Dank' al dio, mi ne apartenas al lageneracioj, kiuj konas la teruron de la milito: Eŭropo vivas en paco jam tri jardekoj kaj duonon. Sed vespere mi enlitiĝas maltrankvila. Ĉiu scias, kio pli-malpli estas amasigita en la arsenaloj kaj kiom malpli estas sufiĉa, por ke la Tero transformiĝu en senvivanta dezerto.

Mi memoras la stratojn de Varsovio, ĉar ĉe ĉiu paŝo sur ili estas memortabuloj el la milito kaj antaŭ ĉiu flagetas kandelingo. Mi staris animskuita en la blankrusa vilaĝeto Hatin: la vilaĝeto fakte malestas, dum la milito ĝi estis transformita de la hitleranoj en cindrejon; nun ĝiaj senfumaj kamentuboj staras obeliske kun surĉizitaj nomoj de ekstermitaj viroj, virinoj kaj infanoj. Vaginta mi estas tra la ruinigita de la milito vjetnama tero — tie la pecoj de avio-bomboj, obusoj kaj kugloj estas pli multaj ol la abundaj tropikaj herboj. La malfeliĉo estas forpasinta. Restis nur la terura rememoro; la vivantoj konstruis sur la ruinoj novan vivon. Sed nun estas alio: se ni, el la lasta kvarono de la XX jc., permesos la militon, eĉ ne estos ruinoj, ne estos homoj post ni. Tial ĉiumatene mi vekigas kun la espero, ke nia soifo pri vivo venkos, ke la prudento venkos, ke niaj streboj kaj klopodoj por la paco venkos.


Estas io profunde absurda en la paralelo, ke ju pli la homaro kreskas intelekto, des pli malprudenta ĝi fariĝas. La homo penetris supren, en la kosmajn abismojn kaj malsupren, en la oceanajn abismojn, penetris en la sekretojn de sia propra psiko, penetris en la mondon de la mikroorganismoj kaj en la strukturon de l'atomo; sed la plej absurda estas tio, ke troviĝas homoj el la lasta kvarono de la XX jc., kiuj transformas la atomon kaj la bakterion, sian propran psikon, la oceanon kaj la kosmon en rimedon de memmortigo. Timigaj estas la megatunoj, egaligitaj al trotila ekvivalento, sed ankoraŭ pli timigaj estas ili, egaligitaj al la kuŝanta en ili malico, egaligitaj al la patologia mizantropa malamo de la imperialismo, egaligitaj al la frenezaj planoj pri regado super la mondo.

En la fino de la pasinta jaro sub la premo de Usono kelkaj okcidenteŭropaj landoj decidis instali sur sia teritorio la novajn usonajn raketojn kun meza radiuso de agado. Tio okazis spite al la mondaj pacamaj fortoj. Mi estas nepretendema homo; min interesas la spirita vivo de la mondo ĉirkaŭ mi. Se estas necese nepre morti, por mi estas tute egale ĉu pro la modernaj „Parŝing-2“ aŭ pro „Tomahouk“, aŭ pro „Trajdant“, aŭ pro la malmoderna

jam atombombo, kiu ruinigis Hiroŝimon. Sed ni revenu al la okcident-eŭropaj politikistoj: rideto de mortonto montriĝis ilia rideto; montriĝis ke spite al si mem ili agis; montriĝis, ke ili libervole transformiĝis en paŝelojn, ĉar post la novaj raketoj Usono prezentis al ili sian novan strategion pri „daŭra kaj limigita“ nuklea milito, aŭ „limigita infero“, kiel nomis ĝin aliaj, aŭ „reala nuklea memmortigo“ — kiel tuj orientiĝis triaj. Miaj pretendoj al la vivo estas malmultaj: finkreskigi miajn infanojn, respondi al kelkaj turmentaj demandoj per miaj libroj, ĉiutage mia konscienco estu pura — kaj ĝuste por tio mi ŝatas vivi.

Estas io profunde trankviliga en la dialektiko, ke ni devis alveni ĝis la fino de la absurdo por kompreni ĝin kaj ekstari kontraŭ ĝin; la rimedoj por nia memmortigo estas pretigitaj; mankas nur la malbona okazo aŭ motivo, aŭ diablo scias kio. Por enlitiĝi kaj ellitiĝi ne kun la penso pri la nuklea pereco, sed kun la penso pri la tritiko, kiun ni deziras kreskigi, pri la domoj, kiujn ni deziras konstrui, pri la libroj, kiujn ni deziras verki, pri la infanoj, kiujn ni deziras krei, pri la riveroj, kiujn ni deziras bari — ni devas fari decidajn paŝojn. Nun, dum tiuj ĉi tagoj tie ĉi, en nia socialisma Sofio, kunsidas la Monda Pacparlamento de la Popoloj; esprimas sian volon pri vivo la homoj el ĉiuj anguloj de la tero, ni, el la lasta kvarono de la XX jc.; ĉiuj parolas honeste pri la dimensioj de la malbono, ĉiuj parolas, kiel oni povas fari ĝin rememoro.

EL LA ASEMBLEO „STANDARDO DE LA



Dum la tagoj, kiam kunsidis la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco, en Sofio okazis ankaŭ renkontiĝo de infanoj el 86 landoj. Per tiu renkontiĝo la infanoj de la mondo notis la unuan jaron de la Asembleo „Standardo de la Paco“. Sofio denove transformiĝis en ĉefurbon de la libera kaj feliĉa infana rido, de la sincera internacia infana amikeco. Kelkcentoj da infanoj kantis siajn plej novajn, de ili komponitajn kantojn, deklamis siajn versojn, pentris sur folioj kaj stratoj, dancis siajn popularajn dancojn en buntaj naciaj kostumoj, travivis neforgeseblajn momentojn sub la sonoj de 53 sonorilejoj de la unika monumento „Standardo de la Paco“, al kiuj nun aldoniĝis la ĵusalvenintaj sonoriloj el Aŭstralio, Argentino, Belgio, Zambio, Islando, Kanado, Kolumbio,

Kubo, Malto, Rumanio, Turkio, la Filipinoj k.a. En la plej renoma salono en la ĉefurbo estis aranĝita granda ekspozicio de infanpentraĵoj. Por tiu ekspozicio alvenis 1300 pentraĵoj el 47 landoj kaj pli ol 500 el Bulgario. Post la ekspozicio ĉiuj konserviĝis en la fonduso de la Asembleo.

La infanoj-gastoj havis multajn renkontiĝojn kun elstaraj bulgaraj verkistoj, muzikistoj, artistoj, pentristoj, arkitektoj kaj aliaj kulturagantoj, kun partoprenantoj en la Parlamento de la Paco, ĝuis ekskursojn al vidindaj lokoj de Bulgario. Ĉie ilin renkontis la ĝoja gastamo kaj sincera amikeco de la bulgaraj homoj, konstruataj sian novan vivon en paco kaj libereco, etendantajn manojn al ĉiuj popoloj en la nomo de la feliĉaj hodiaŭ kaj estonto de ĉies infanoj.

LETERO — ADRESO

DE LA INFANOJ PARTOPRENINTAJ EN LA RENKONTIĜO «SOFIO — 80»

AL LA INFANOJ DE LA TUTA MONDO

**Karaj geamikoj!
Infanoj el ĉiuj kontinentoj!**

Sofio — tiu urbo antikva laŭ aĝo kaj juna laŭ spirito portanta la nomon de la saĝeco, denove malfermis siajn gastamajn pordojn por ni, la infanoj el ĉiuj anguloj de la planedo, por festi sub la varma suno de Bulgario la unuan jaron de la unua en la mondo Infana Asembleo «Standardo de la Paco».

Denove sub la flughava devizo «Unueco, kreado, beleco» niaj sonoraj voĉoj kunigis en unueca komuna horo de la harmonio. Niaj puraj ridetoj lumigis per sereneco la animojn de la homoj de la planedo — ili estas helaj radioj, sunlevigoj kaj aŭroro en nia maltrankvila tempo. Denove la batoj de niaj koroj kunigis kun la sono de la monumento «Standardo de la Paco» kaj aŭdigis nian ardan alvokon: pacen sur la planedo!

La alvoko de la unua Asembleo «Standardo de la Paco» nur por unu jaro reeĥis profunde en la koroj de

ĉiuj da ĝojo ni kreas niajn novajn verkojn — la riĉajn septembrajn fruktojn de la semilaj en 1979 jaro ĝermoj en la fekunda bulgara tero! Kaj kiel bone vidigas la antaŭstaranta mateno, kiam la ideoj de la Asembleo, sub la aŭdaca devizo «Unueco, kreado, beleco» unuigis milojn da mensoj kaj manoj por kreo de pli feliĉa, pli bela kaj pli perfekta mondo!


Nia alvoko al kreado kaj beleco pliriĝis ankaŭ per la scienca-teknika kreado de la infanoj, kiuj estos konkerantoj de la Universo, ordonantoj de la Kosmo, konstruantoj de la homa estonteco. Je la nomo de tiu ĉi idealo — la bela estonto de la homaro — ilia scienca-teknika kreado aligis al la ideo de nia Asembleo. Tial ni adresas nin al vi kun alvoko: ridigu viajn mensojn per koroj en la sfero de la scienco kaj tekniko kaj paralele kun la kantoj, poeziaĵoj kaj pentraĵoj donu verkojn ankaŭ de la scienca kaj teknika kreado, por ke ni konstruu bela kaj saĝa la estonton de la Tero — la ĝerta domo de la homaro.

Ni, la infanoj de la internacia renkontiĝo «Sofio — 80», adresas nin al vi, la infanoj de la tuta planedo!

Pli potence eksonas en 1982 jaro la voĉoj de niaj sonorilejoj kaj memorigoj al la mondo, ke ĝiaj infanoj estas unuigitaj en sia alvoko pri unueco, kreado kaj beleco! Flores la floroj en la ĝardeno de la amikeco, alfortitaj de ni el ĉiuj anguloj de la mondo, kantas la vento en la brandoj de la plantitaj de ni arboj, kaj la bulgaraj infanoj gardas dum la jaroj tiun ĉi vivan simbolon de la unueco de la infanoj de l'mondo en ties strebado al beleco kaj paca verkado.

Enskribu profunde en viaj koroj, ne paligu ĉe ni la atendado de la granda festo, kiu kolektos nin ĉi tien post du jaroj! Kreu impeto kaj kuraĝo, por ke ni renkontiĝu kreskintaj spirite kaj kree, pliriĝintaj en la dua Asembleo «Standardo de la Paco» — Sofio 1982 jaro! Unua Asembleo pliriĝis per miloj da novaj verkoj — vivigojaj kantoj, buntaj pentraĵoj, sonoraj versoj. Kun la infanoj en la tuta mondo, kaj al nia renkontiĝo «Sofio — 80» venis infanoj el 86 landoj — de la varma sudo ĝis la malproksima nordo. La krea fonduso de la

PACO SOFIO — 80“



Sur la fotoj:

1. En naciaj kostumoj bulgaraj infanoj manifestis sian arton vigle kaj belege plenumi popoldancojn.
2. Kantoj kaj recitaĵoj en ĉiuj lingvoj antaŭ la monumento „Standardo de la Paco“ apud Sofio.



GRANDA PACKUNVENO

Omaĝe al la Parlamento de la Paco la 24an de septembro okazis amasa kunveno de la sofiaj e-istoj. Ĉeestis reprezentantoj de la Monda Packonsilio: d-ro Karoly Lauko — sekretario de la Packonsilio, kiu salutis la ĉeestantojn en la nomo de la Prezidanto de Monda Packonsilio Romeo Candra, d-ro Imre Varkonyi kaj Angyal Barnabas. Ĉeestis ankaŭ la prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) Imre Pethes kaj la ĝenerala sekretario William Gilbert, kiuj ankaŭ faris salutparoladojn.

La prezidanto de la kunveno Nikola Aleksiev proponis kaj oni varme akceptis saluttelegramon al la Parlamento de la Paco (kiun ni donas aparte).

Estis plenumita riĉega belarta programo, kiun partoprenis la infana artgrupo „Verdaj Steloj” sub la gvido de Mihail Elenov, la ĥoro de la sofiaj e-istoj sub la direktado de Dimitro Terziev kaj individue per recitaĵoj la artisto Mišo Zdravev, la infanoj Iveta Cvetkova, Evelina Mineva kaj Krasimira Hristova, per kantoj la artistino el la Muzika Teatro de Jambol Galja Kostova, Karamfilka Adamova kaj Dimitro Denčev. Bogomila Ikonova plenumis violone „Brilantan polonezon” de Vienjovski. Originalan programon prezentis la aktoro geedza paro Belka Beleva kaj Anani Anev, montrante grandformate pentritajn de Anev kontraŭmilitajn karikaturojn.

La tuta kunveno bone spegulis la ardan amon de la sofiaj e-istoj al la tutmonda paco kaj la internacia amikeco, ilian pretecon labori kaj batali per E-o por la triumfo de tiuj altnoblaj idealoj.

DEKLARO

Ni, la esperantistoj, partoprenantoj en la kunveno okazinta la 24an de septembro 1980, organizita de CE de BEA, de Bulgara MEM-Komitato kaj Distrikta kaj Urba Estraroj de BEA en Sofio honore al la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco, varme salutas la kunvokon de la Parlamento kaj tute bonevenigas la deputitojn de la paco el diversaj anguloj de nia terglobo, alvenintajn por partopreni tiun ĉi historian forumon.

Ni arde deziras al la Parlamento fruktodonan laboron kaj esprimas nian profundan esperon, ke la vortoj, eldiritaj en Sofio — „Urbo de la Paco” — atingos la konscion de milionoj da homoj en la tuta mondo kaj prezentos gravan kontribuon en la klopodoj de la popoloj forigi la pendants minacon de nuklea milito kaj la militon ĝenerale kaj por ĉiam ĉesigi la frenezan armadkonkuradon de homaj fortoj kaj monrimedoj utiligataj de la imperiismo por nenligo de la vivo sur la tuta planedo.

Ni deklaras, ke ni faros nian eblon por popularigi la dokumentojn de la Parlamento, por la realigo de ties decidoj kaj por la varmigo de la internaciaj rilatoj.

Vivu la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco!
Vivu la daŭra kaj justa paco!

LA INTERNACIAJ KURSOJ DE E-INSTRUISTOJ

De la 11 ĝis la 30 de aŭgusto la 20-taga Internaciaj Kursoj de Instruistoj de E-o unufoje okazis ne en Burgas, kiel ĝis nun (jam 8 jarojn), sed en u. Varno. Ili estis organizitaj de la Internacia E-kurseroj kaj la Instruista Sekcio de BEA.

Dum tre mallonga tempo por diskonigo pri la ŝanĝo de la loko al la kursoj aliĝis ĉ. 70 personoj, inter kiuj 11 rumanoj, 2 sovetianoj (el Leningrado) kaj la ceteraj — bulgaroj.

Funkciis 3 grupoj por lingvolernado (I grado kun gvidanto doc. Georgi Dimov, II grado kun gvidanto Jordan Angelov, III grado — sub la gvido de Fani Mihajlova). Funkciis ankaŭ metodika grupo kun gvidanto Kunčo Vălev.

Loĝado — en bonaj studentaj komunloĝejoj, 17-etaĝaj, kun riĉa videbleco al la ĉarma urbo, Nigra Maro kaj ĝia golfo. Aparte rava estis tiu panoramo nokte, kun la lungirlandoj, signantaj la arteriojn de la vigla urba trafiko, la centran strandon, la loĝdomojn...

Ĉiutage ĉiu grupo havis po 4 studhorojn, la metodika grupo — ĉe pli pro sia speciala programo. La manĝado okazis en tre bona studenta komunmanĝejo, proksime situanta.

Aparte ĝojiga momento: tri tagojn en la kursoj gastis simpatia irana E-familio (gepatroj kun du filinoj). Revene el la Stokholma UK de E-o ili deziris vidi nian landon, kaj bulgaraj e-istoj helpis ilin. La gastoj sukcesis konatiĝi kun Sofio kaj Varno. En la kursoj s-anino Azra, la patrino, rakontis pri sia lando kaj popolo, pri la E-movado tie. La ĉarmaj filinetoj Gelare (14-jara) kaj Alale (10-jara) kantis en irana kaj E-o.

Dum la kursotagoj estis aranĝitaj ekskursoj al Balĉik kaj Alvena, al la ege interesa loko „Pobiti Kamani”, similanta ŝtonarbaron, al vidindaĵoj en la urbo mem.

Notinda estas ankaŭ la renkontiĝo inter la kursanoj kaj la lokaj e-istoj en salono en la urbo. Impresojn pri UK en Stokholmo rakontis k-do Kunčo Vălev. Pri la antaŭstarantaj taskoj de la bulgaraj e-istoj parolis la gastanta en la urbo k-do Nikola Aleksiev. La kursanoj laŭ gradoj manifestis sin per kantoj kaj recitaĵoj. La renkontiĝo finiĝis per viglaj dancoj.

Ce la fino de la kursoj okazis ekzamensio. En la speciala metodika grupo diplomiĝis pri instrurajto de E-o 13 gesamideanoj.

La E-kursoj en Varno — la perlo de Nigra Maro — havas bonegan perspektivon. Ni kredas, ke surbaze de la akirita ĉi-jare sperto ilia organizado dum la sekvaj jaroj farigos ĉiam pli kaj pli bona, ilia rezulto — ĉiam pli riĉaj kaj altkvalitaj. Ili vere povas okupi unu el la unuaj lokoj inter samspecaj aranĝoj en la tuta mondo.

K. V.

Kursanoj el I kaj IV gradoj sur la 17a etaĝo de la E-kurseroj kun siaj gvidantoj G. Dimov kaj K. Vălev





Eldiro de
KALJO BJELNDOV
prezidanto de DE
de BEA — Burgas

EL LA DISKUTADO DUM
LA 40a KONGRESO DE BEA

NI INTENSIGU NIAN PROPAGANDON!

En la tuta lando estas kreita bone organizita reto de E-societoj kaj distriktaj E-estranjaroj, kiu ĉiam viglas laborante por la progreso de nia lingvo kaj Movado.

Ankaŭ ni, en Burgas, havas sukcesojn. Antaŭ kelkaj jaroj en niaj vicaj domoj la blankharuloj. Ni kun ĝojo raportas, ke nun jam venis junaj homoj, kio promesas novajn, pli grandajn sukcesojn. Aparte ni notas, ke en nia urbo fondiĝis teatra E-trupo de lernantoj, kiu funkcias ĉe la Distrikta Dramteatro. Ĝi jam kelkfoje bonege prezentis la spektaklon „Fabeloj por grandaj kaj malgrandaj“ de Andersen. Ankaŭ nun la kongresanoj havos eblecon ĝui ilian majstran ludon.

Granda sukceso de nia Centra Estraro estas la plibonigo kaj pligrandigo de la asocia organo „Bulgara Esperantisto“. Restas tamen plue plibonigendaj la papero, la literaturo, ankaŭ la enhavo. Nepe oni donu lokon al materialoj por la novaj e-istoj.

La CE de BEA devas organizi pli bone la propagandan laboron de E-o. Malgraŭ ke la E-movado en nia lando estas forta, ankoraŭ troviĝas homoj, kiuj tute ne aŭ neplene scias, kio estas E-o, aliaj havas tre

erarajn imagojn kaj opiniojn pri ĝi. Per la gazetaro — centra kaj loka, per la radio kaj televido, per presperantaj eldonaĵoj k.a. oni devas pli amplekse informi la eksteran publikon pri E-o, pri la celoj de la E-movado, pri la laboro de la e-istoj en nia lando kaj en eksterlando. Niaj amikoj el Hungario donas bonan ekzemplon — ili aperigas interesan propagandan revuon nacilingve. Mi memorigas ankaŭ pri la bonega rolo de la bulgarlingvaj ĵurnaloj „Mejdunaroden Ezik“ kaj „Rabselkor“ en la komenco de la 30aj jaroj.

Por disvastigi E-on en la lernejoj ni devas pli insiste kaj laŭplane agi en la Ministerio de Popola Klerigo. En la lernejoj estas la juneco de nia popolo. Jam venis la tempo komenci E-agadon en la parlamento, fondi parlamentan E-grupon. Tiaj grupoj jam ekzistas en vico da landoj.

Pri la statuto: ĉar niaj E-kongresoj okazas malofte — ĉiun kvaran jaron, estos utile por nia laboro okazigi ĉiun duan jaron post la kongreso nacian konferencon. Tiamaniere ni pli ofte traktos niajn problemojn kaj puŝos la Movadon antaŭen. Dum la kongresoj havas precipe manifestacian karakteron, tiuj naciaj konferencoj devas havi nur aferecan karakteron.

La CE de BEA devas organizi pli bonan eldonagadon. Necesaj estas belartaj libroj, instruhelpiloj, propagandiloj en E-o. Ankaŭ la Bulgara Esperantista Kooperativo devas plenumi sian devon — finance helpi la eldonagadon kaj mem eldoni esperantaĵojn — kovertojn kaj paperojn kun E-signoj, bildkartojn kun E-surskriboj, E-flagetojn, insignojn k. a. — oni devas esti pli inventemaj tiurilate.

NOVA E-SOCIETO

Ce la sociaj organizaĵoj kaj administraj oficejoj en u. Ruse estis fondita E-societo kun la nomo „Kulturo“. Ĝi havas 20 membrojn.

Oni elektis jenan estraron: Stojčo Cankov — prezidanto, sekretario Rumjana Gaĝanova, kasisto Maria Bošnjakova.

Estis akceptita plano por estonta agado. Ĉiuj membroj deklaris sian pretecon aboniri revuon „Bulgara Esperantisto“.

S. C

BONA POSTKONGRESA PAŜO

La 14an de septembro la gastama arbaro domo en u. Kubrat akceptis 27 E-aktivulojn el la tuta distrikto Razgrad. Okazis plenkunveno de la Distrikta Estraro de BEA. Oni tralegis la rezolucion de la 40a jubilea kongreso de la bulgaraj e-istoj. Post fruktodona traktado estis voĉdonitaj konformaj decidoj, post kio estis diskutita la ĝisnuna kaj estonta laboro de la E-societoj en Razgrad, Kubrat kaj Isperih.

Ĉiu klubo raportis pri siaj rezultoj kaj pri la entreprenoj por la nova E-lernojaro, abonkampanjo, membrokoltizo k. a. Tio estis tre utila interŝanĝo de spertoj inter la kluboj. Fine oni akceptis konformajn decidojn. La kubratanoj raportis pri sia preparlaboro por la 7a VARE.

Anton Antonov

VII VINTRA AMIKA RENKONTIĜO ESPERANTISTA (VARE)

31. I — 1. II. 1981 — KUBRAT

Karaktero: festivala.

Partoprenantoj: el tuta Norda Bulgario.

Kolizoj: vespermanĝo — 5 levojn, tranoktado — 2 levojn.

Aligdato: 5. I. 1981. Eksterlandanoj pagas surloke (post anticipa skriba averto).

Korespondantoj kaj sumojn sendu al: Anton Antonov — str. Pirin 5, 7300 Kubrat.

Venu are al la sepa VARE!

PARTOPRENU EKSURSON!

La komisiono de internacia agado ĉe la Distrikta Estraro de Ruse organizas nur por esperantistoj ekskurson al Sovetunio de la 17 gis 28 de aprilo 1981 pere de „Balkanturist“.

Itinero: Ruse — Moskvo — Leningrado — Riga — Ruse.

Antaŭviditaj estas renkontiĝoj kun la e-istoj: en Moskvo — 19. IV, Leningrado — 22. IV kaj Riga — 24. IV.

Proksimuma prezo: 270 levojn.

Adreso por pli detalaj informoj kaj aligoj: 7000 Ruse, p. k. 208, Stojčo Cankov.

RENKONTIĜO DE E-GENERACIOJ

Dediĉe al la 40a jubilea kongreso de BEA, la 1300-jara jubileo de la bulgara ŝtato kaj la 50-jariĝo ekde la fondiĝo de Bulgara Laborista E-Asocio, la junulara sekcio de E-societo „Espero“ en Vidin efektive benon iniciaton: eltrovis E-veteranojn el Vidin kaj ĝia distrikto kaj invitis ilin al renkontiĝo kun la E-junularo.

La renkontiĝo okazis en la Junulara Domo de Vidin. Ĉeestis la jenaj E-veteranoj: Boris Rangelov, Ignat Nikolov, Georgi Simeonov, Ivan Pazderski, Georgi Jovov — ĉiuj ili multe laboris por E-o dum sia juneco, kelkaj ankaŭ nun aktivas malgraŭ sia progresinta aĝo.

Post salutvortoj al la veteranoj la junaj e-istoj prezentis por ili belartan programon. Sekvis la plej interesa: la veteranoj rakontis rememorojn el sia E-vivo kaj E-laboro, pri la praktika uzado de la Internacia Lingvo en la batalo kontraŭ la nigra faŝismo — por libero kaj justeco en nia lando, por amikeco kaj solidareco inter la progresemaj homoj en la mondo.

La renkontiĝo profunde emociis kaj junajn, kaj maljunajn.

V. Ĉokova

JUNULARA EKSURSO TRA PIRIN-MONTARO

Omago al la 1300-jara datreveno de la fondiĝo de la bulgara ŝtato grupo da e-istoj el la junulara sekcio de Distrikta Junulara Domo en Ruse organizis marŝadon tra la bela Pirin-montaro.

La 25-an de julio je la stacidomo de Ruse estis vinitaj por akompani nin multaj amikoj kaj konatoj. Bonhumore ni ekveturis sub la gvido de V. Angelov — respondeculo pri la turisma agado de la sekcio.

Ni atingis bonorde stacidomon Dobriniste kaj ekgrimpis la montaron. La migrado estis laciga, sed ni venkis la malfacilaĵojn kaj dum 9 tagoj trairis la planitan itineron: Ruse — Plovdiv — Septemyri — Dobriniste — Ribarnika — montodomo „Goce Delčev“ — pinto Bezbog — Popovi Ezera — Gangalska Porta — Todorina Porta — montodomo „Demjanica“ — pinto Vihren — montodomo Bänderica — Banskó — Blagoevgrad — Sofia — Ruse. La celo estis montosupro Vihren, kie ni metis memorplaton kun surskribo.

La ruseaj e-istoj salutis la iniciaton de la gejunuloj kaj bondeziris al ili ĉiam esti persistaj kaj entuziasmaj en la E-agado.

Dobrinka Ĉernogorska

**ABONU NIAN ASOCIAN ORGANON
„BULGARA ESPERANTISTO“**

Ĝi estas via bona informanto kaj instruanto, via necesca helpanto, via fidela amiko.

Abonigu viajn konatojn, vian lokan legejon kaj kulturdomon, viajn eksterlandajn amikojn!

KIEL ESPERANTO HELPIS MIN

Post la decida militoperacio de la Ruĝa Armeo ĉe la urboj Jaŝ—Kiŝinev, je la fino de aŭgusto 1944 j. la hitler-faŝisma armeo komplete estis forpuŝita el la sovetia teritorio. Hitler ordonis retiriĝon de sia armeo el la Balkana Duoninsulo (el Grekujo, Jugoslavio, Bulgario).

En 1944 j. mi estis mobilizita kiel rotestro en 5a regimento — urbo Ruse. Iun tagon komence de septembro oni invitis min en la batalionan stabon kaj ordonis al mi iri kun mia roto akcepti germanan baterian armilaron en la regiono de la sukera fabriko de Ruse.

Renkontis nin germana militestro. Li komencis paroli al mi germane, sed mi ne konis la germanan kaj nenion komprenis. Mi ekparolis en E-o. La germana militestro ekridis kaj ankaŭ ekparolis en E-o. Li rakontis, ke antaŭ la milito li estis instruisto kaj lernis E-on. Ni tuj sentigis amikoj kaj kore manpremis. Sajnas al mi, ke li estis progresema homo.

Li donis al mi nomaron de la armiloj kaj ni ekiris de kanono al kanono. Apud ĉiu ni aranĝis postenon de bulgaraj soldatoj.

Ce la unua kanono mi konstatis, ke la supra vitro estas rompita. La germana oficiro klarigis, ke peco de rusa bombo rompis ĝin. Vere, antaŭ du tagoj okazis mallonga pafado inter la sovetaj kaj la germanaj trupoj (la ruĝarmeanoj pafis el Gurgu — Rumano).

Mi marŝis sur malgranda herboriĉa kampo. Ĝi estis ĉirkaŭita de alta maizo. En la kvar anguloj de la herbejo, tre proksime al la maizo, estis po unu kanono de zenita artilerio. Ni proksimiĝis al la unua kanono. Mi rimarkis maldikan ŝnureton, kiu ligis la kanonon kun la skatolo. Turnigante al nia gvidanto, la germana estro, mi severe demandis: „Kio estas tio?“ Ni haltis. Li ekrigardis min ankaŭ severe, faris signon per sia mano kaj diris: „Ĉiuj for de tie ĉi!“ Ni malproksimiĝis. La oficiro malrapide iris al la kanono kaj atente forigis bombon kaŝe kroĉitan sub ĝi.

Mi aranĝis postenon el tri soldatoj kaj ordonis al ili ne permesi alproksimiĝon de civitanoj al la kanonoj. Ili havis bonegajn pneŭmatikojn, kiujn ege bezonis ŝoforoj.

Tiel per E-o mi savis la vivon de miaj soldatoj, kiuj pro malatento aŭ pro nescio povus palpi la ŝnureton. La bombo detruos ne nur la kanonon, sed ankaŭ nepre tiun, kiu palpus la ŝnureton aŭ troviĝus proksime al la kanono. La soldatoj, kiuj servis ĉe ni tiam, ne havis bonan sperton, ĉar nur 75 tagojn ili lernis la militservon.

Tiun okazon mi neniam forgesos. Esperanto grave helpis min.

Pavel Harlov

LITERATURA KONKURSO

KOMITATO DE KULTURO — DOMO-MUZEJO
ĈUDOMIR — ESPERANTO-SOCIETO «ROZA VALO» —
KAZANLĀK

anoncas konkurson pri tradukado de rakonto de Ĉudomir en E-on. Por la plej trafe kaj bone tradukitaj rakontoj estos I, II kaj III premioj (60, 50 kaj 40 levoj).

Limtempo por prezenti la tradukojn: la 28 de februaro 1981.

La konkurso estas sekreta. La traduko devas esti subskribita per pseŭdonimo. La saman pseŭdonimon oni skribu en malgrandan koverton, en kiun oni metu la gŝstan nomon de la tradukinto kaj la adreson. Ĉion oni metu en grandan koverton kaj sendu ĝin al adreso:

6100 KazanlĀk, str. Otec Paisij 12. Esperanto-Societo „Roza Valo“ (por la konkurso).

Ni bondeziras sukceson al ĉiuj, kiuj amas Ĉudomiron kaj E-on!

LA 36A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE TEJO

25 de julio — 1 de aŭgusto 1980

Estis posttagmeze, la 25an de julio. La sovetia aviadilo, per kiu mi veturis el Moskvo, post ne-longa flugado super la sinbananta en sunradioj Finna Golfo alproksimiĝis al Helsinko — la ĉefurbo de Finnlando. Tiel komenciĝis mia unuaj kaj neforgesebla vizito en tiu ĉarma lando de labirintaj lagoj, sorĉaj insuloj, imponaj arbaroj, riveroj kun multaj akvofaloj. Laŭ areo ĝi estas unu el la plej grandaj eŭropaj landoj, sed havas nur 4,7 milionojn da loĝantoj. La aviadilo jam flugis super la abunda ĝi insuloj marborda regiono, rondflugis super Helsinko — moderna urbo kun multaj kulturhistoriaj vidindaĵoj en novklasika stilo kaj loĝkvartaloj meze de la naturo, similantaj al malgrandaj parkuroj.

La kongreso okazis en la sudorienta urbeto Rauma ĉe Balta Maro. Ĝin partoprenis 332 reprezentantoj de 31 landoj, inter kiuj 4 bulgaraj ĝeĵunuloj.

La finnoj estas homoj, kiuj senripoze serĉas vojojn al plua progreso, sed samtempe ili tre zorgeme flegas siajn popoltradiciojn. Tial la ĉeftemo de la 36a IJK de TEJO — „La popola tradicio en la nuntempa mondo“ — trovis tre konvenan medion en la tradicio-riĉa Rauma. Tiu temo estis traktita en multaj laborgrupoj kaj prelegoj. Enkondukon al la temo faris Walter Zelazny (Pollando) per sia prelego „Historio de la popolkutimoj“. Per la traktado de la ĉeftemo la E-junularo montris sian intereson pri la popola tradicio kaj ties konservado.

Iuj kongresanoj preferis ekzotikajn temojn kaj pri tiaj temoj okazis kelkaj prelegoj: „Papua kulturo“, „Antila kulturo“, „Kulturo por la cigana popolo“ ka. Intereskapaj estis ankaŭ la laborgrupoj pri japanaj tradicioj: en „Origami — paperfaldado“ oni kreadis mane paperaĵojn. Estis eĉ la laborgrupo „Popola medicino“, en

kiu surfone de la kultura heredaĵo prezentigis trajtojn de la orienta kaj okcidenta kuracarto kaj la rolo de la popola kuracado.

Profesinivele prelegis prof. dr. H. Tonkin, la prezidanto de UEA, je temo „Kiel popolo farigas nacio“ kaj Leena Sammaltahti el Finnlando pri „La etnografia scienco en Finnlando“.

„Esperanto en la 80aj jaroj — celoj kaj metodoj de la E-movado“ nomigis granda debato, kiu okazis en kvar sesioj. Post koncizaj enkondukoj de la gvidantoj Jonko Linstedt (Finnlando) kaj Amri Wandel (Israelio) okazis vigla diskutado, kiu daŭris dum ĉiuj kunvenoj. Oni notis, ke ĝis nun la E-movado ne sukcesis realigi sian pracon — fari E-on oficiala internacia lingvo. En internacia skalo la e-istoj estas ankoraŭ malfortaj el vidpunkto de ŝtatoj kaj grandaj organizaĵoj. La pozicio de la angla lingvo fariĝis tre forta. Do, la e-istoj ne klopodu anstataŭigi ĝin kaj la aliajn grandajn lingvojn, sed evoluigu, riĉigu kaj disvastigu la kulturajn valorojn de la Internacia Lingvo mem. En la diskutado pri metodoj la okcidentaj parolintoj neglektis la utilan aplikon de E-o en la socia vivo, scienco kaj kulturo — la plej ĝusta vojo por ĝia plua sukcesa disvastiĝo. La diskutantoj emfazis la kreskintan rolon de la amaskomunikiloj en la nuntempa mondo, sed nur reprezentantoj el la socialismaj landoj indikis, ke la kulturaj valoroj kaj praktikaj avantaĝoj de E-o plej bone propagandigas per sociutilaj aktivecoj, kiuj havas plej grandan ŝancon enpenetri la amaskomunikilojn. Post la finigo de la debatado aperis sinteza dokumento „Manifesto de Rauma“.

La kunsidoj de TEJO-Komitato estis maratonaj kaj daŭris preskaŭ 30 horojn. Plej temporaba estis la traktado kaj reviziado de la projekto de Kongresa Regularo.

Estis faritaj kelkaj negravaj ŝanĝoj de la Komitato Regularo kaj akceptita Regularo pri Honoritoj. La slovaka kaj flandra E-organizaĵoj eniris TEJO-n. Pro la retiro de la ĝisnuna prezidanto Stefan MacGill (Nederlando) kaj la estraranino Zdravka Metz (Jugoslavio) okazis elektoj de du novaj estraranoj — Tomasz Kudriewicz (Pollando) kaj Marienne Böckmann (FRG). Kiel nova prezidanto de TEJO estis elektita Csaba Lendvay (Caba Lendvaj) — Hungario. La venontjara IJK okazos en Oaxtepec (Meksikio).

La distraj kaj kulturaj aranĝoj de la kongreso konsistis el la tradiciaj interkona, internacia kaj adiaŭa vesperoj. Unu el la plej sukcesaj programeroj estis la literatura vespero, enkadre de kiu estis diapozitiva prezento pri la temo „Originala literaturo en Esperanto“. Ĉu? kaj spektaklo de linna kanzonkantisto M. A. Numminen. La premion pri originala E-literaturo „La verko de la jaro“ gajnis „La turoj de la ĉefurbo“ de Mauro Nervi (Italio) kaj „Ĉu li bremsis sufiĉe“ de Johan Valano (Svislando). La finna vespero okazis en la tradicia finna vesperfesta tipo „iltamat“. La finna E-teatro ludis propran dramigon de la rakonto „La fervojo“ de Juhani Aho. Dezirantoj po grupoj vizitis aŭtentikan finnan ŝvitbanejon „sauno“. Mi ne forgesas ankaŭ la sportajn aktivecojn: futbala matĉo inter Finnlando kaj la ceteraj landoj kaj retpilkado.

La tuttaga ekskurso okazis en spirito de la kongresa ĉeftemo. Ni estis en la kampara komunumo Laitila je 30 km for de Rauma. Vizitita estis ankaŭ la komunuma centro, preĝejo kaj bienmuzeo. Posttagmeze per akvobuso ni ekskursis inter la ĉeborda insularo. Poste ni trarigardis la artmuzeon de Rauma kaj vizitis akvoturon.

Evgeni Georgiev

La paperfaldado estis ŝatata manlaboro

Dancoj surborde dum la ekskurso al Laitila





E-Asocio de Finnlando eldonis en decembro 1979 medalon omage al sia honora prezidanto Vilho Setälä, la nestoro de la finnlanda E-movado, kiu tiam festis sian 85an datrevenon.

La medalo estas el bronzo kun diametro de 70 mm. Sur la medalo estas la profilo de d-ro Setälä kaj liaj vortoj „Kaj lukti fidele por lumo“. Sur la dorsflanko estas figurita monda mapo kun simboloj de libera komunikado kaj kunlaboro inter homoj de la tuta mondo.

La medalo estas mendebla ĉe Esperanto-Asocio de Finnlando, PL 48, SF-00131 Helsinki 13, Finnlando. Ĝia prezo estas 120 finnaj markoj; ebleco de interŝanĝo kontraŭ revendeblaj eldonaĵoj ekzistas.

REEĤOJ DE LA 40A KONGRESO DE BEA

Dediĉe al la 40a kongreso de BEA nia amiko kaj kunlaboranto Rudolf Eichler el Schwarzenberg (Svarcenberg) aranĝis belan vitrinon apud la fervojstacio de la urbo. Meze de la vitrino li pendigis la kongresan afiŝon, ĉirkaŭe — korespondadojn el Bulgario, numerojn de revuoj „Bulgara Esperantisto“ kaj „Paco“.

En junulara kulturdomo „Ostenstein“ pri la 40a kongreso kaj la bulgara E-movado parolis k-do Hans Heinel, la prezidanto de la Distrikta Laborrondo Esperanto, kiu partoprenis la kongreson en Plovdiv kiel gvidanto de la E-delegitaro de GDR. Pri la kunveno skribis la loka ĵurnalo „Freie Presse“.

Laŭ informoj de R. Eichler

D-ro Urho Kaleva Kekkonen, prezidento de Finnlando ekde 1956, festis sian 80an datrevenon la 3an de septembro 1980. Respondante en oficiala parolado al la multegaj gratulantoj, li interalie primemorigis la junularon pri la neceso lerni kaj koni fremdajn lingvojn. La prezidento konstatis, ke li mem ofte spertis malfacilaĵojn pro nesufiĉa lingvoscio. Malmultaj ŝtatisitoj partoprenis la internacian vivon pli vigle ol Kekkonen.

La prezidento ĉiam simpatiis al la E-movado, kiu esprimis al li sian elkoran gratulon, donacante al li la medalon pri Vilho Setälä — alia granda oldulo finnlanda. Prezidento Kekkonen estis la alta protektanto de la 54a Universala Kongreso en Helsinki 1969.

VERDA FLAGO SUR LA KARPATOJ

Dediĉe al la 35-jara jubileo de la venko super la faŝismo la membroj de la novfondita E-Societo „Flameto“ en urbo Ternopol (USSR) organizis 3-tagan ekskurson al la Karpatoj. Krom ternopolanoj la ekskurson partoprenis 15 e-istoj el Lvov, Ĥmelnickij, Kiev kaj Riga, entute 42 personoj.

Survoje la ekskursantoj havis du tendarajn noktaĵojn kun lignolajroj. Atinginte la montopinton Bliznica (1880 m) ili fiksis tie la verdan flagon. Eksonis la E-himno. Ĉie — survoje kaj surmonte — la grupo kantis E-kantojn, levis E-sloganojn. Tio estis bona propagando de la Internacia Lingvo.

Leon Zimels



K-do Eichler (meze) kun E-geamikoj

„ESPERANTA FINNLANDO“

estas la nomo de la dumonata organo de E-Asocio de Finnlando. Kvankam modesta, ĝi klopodas varie speguli la vigligantan E-movadon en la lando kaj ankaŭ ne permesas al si forgesi la kulturon finnlandan kaj esperantan. Abonojn, kiuj kostas 24 fi. najr markojn jare, oni adresu al: Esperanto-Asocio de Finnlando, PL 48, SF-00131 Helsinki 13, Finnlando. Interŝanĝo kontraŭ revendeblaj eldonaĵoj eblas.

Bulgaroj povas aboni revuon „Esperanta Finnlando“ pere de la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ kontraŭ 3 levo

ANTAŬ LA MEMORINDA 681

NIA LANDO DUM LA ANTIKVA EPOKO



La mezepoka bulgara ŝtato estas fondita en la VII jc. sur la teritorio de la Balkana Duoninsulo, kie jarmilojn antaŭ tio aperis kaj disvolvigis civilizacioj, postlasintaj gravajn spurojn.

Oni akceptas, ke certaj kultur-restaĵoj de plej frua homa vivo ĉe ni ligiĝas kun la meza malnov-ŝtona epoko (ĉ. 100 000 ĝis 40 000 j. antaŭ nia epoko). Apartan lokon inter tiuj restaĵoj prezentas la trovitaĵoj apud la Monaĥejo de Drjanovo.

Tre altan kulturenivelon la bulgaraj regionoj havas dum la tiel nomataj novŝtona, kuproŝtona kaj bronza epokoj en la periodo VII—II jarmiloj a. n. e. La elfositaj loĝlokoj, konservitaj en la sistemo de la tiel nomataj loĝlokaĵ teramasoj, la malkovritaj nekropoloj, la esploritaj ercproduktaĵoj centroj donis abundan materialon, kiu permesas restaŭrigi la vivmanieron kaj la kulturon de la loĝantaro de tiu tempo. Evidentiĝas, ke dum certaj periodoj la bulgaraj regionoj estis unu el la plej gravaj centroj en la eŭropa kontinento. Tiam ĉiufankan floradon tiuj regionoj travivis en la fino de la V—IV jarmiloj a. n. e. La materiala bazo de tiu florado estas la multjara ekspluatado de la eksterordinare riĉaj kupraj ercoj ĉe ni. Tia estis ekzemple la malkovrita antaŭ kelkaj jaroj de Bulgara-soveta ekspedicio ercruŝoj apud Ajbunar, distrikto de Stara Zagora. Por la tiel necesaj kupraj laboriloj sur unu tiel granda teritorio en la Egea mondo kaj la norddanubaj regionoj tiuj ercminejoj estis unu el la ĉefaj liverantoj de krudaj. Trovita estas tre densa por tiu tempo ĉe ni loĝloka sistemo. La loĝlokoj estas jam fortikigitaj, kun regula interna plano. Oni malkovras multajn ceramikojn kun neordinare riĉaj multkoloraj ornamatoj, diversaj monumentoj de la plastiko, precipe kun kulta karaktero, multaj oraj ornamatoj. La trovitaĵoj el la jam

fama nekropolo de tiu tempo en Varna kun centoj da ornamatoj de diversa karaktero (laŭ pezo sume kelkajn kg) starigis tre seriozajn problemojn pri la nivelo de la teknologio kaj aparte pri la socialaj-klasaj rilatoj de tiu socio. De tiam restis ankaŭ la plej fruaj platetoj kun ankoraŭ netraleigitaj surskriboj (de Karanovo kaj Gradiŝnica), samkiel la informoj pri templaj konstruaĵoj kaj pri la disvolviĝo de difinita ideologio, kiu estas aparte klare distingebla en la konservita modelo de la sanktejo apud v. Ovčarovo, distrikto de Targoviŝte, kun figuroj de pastroj kaj de la de ili adorataj naturfortoj.

Dum la bronza epoko (III—II jarmiloj) dank' al nova disfloro de la metalurgio la bulgaraj regionoj transformiĝis en centron, kiu havis influon sur la postrestintaj regionoj de Meza kaj Orienta Eŭropo kaj subtenis aktivan ligojn kun la grandaj egeaj centroj de la kreta-mikena kulturo. En tiu tempo aperis ankaŭ la tracoj kiel baza loĝantaro de vastaj teritorioj en la centraj, orientaj kaj sudorientaj regionoj de la Balkana Duoninsulo. Tracojn oni renkontis ankaŭ sur multaj insuloj: Taso, Samotraki, Lemnos, Imbros. Ili penetris ĉe en Tesalio kaj Mezan Grekujon. Loĝitaj estis ankaŭ iuj regionoj en nordokcidenta Malgranda Azio. Ties nomojn oni unufoje mencias en „Iliado“ kaj „Odiseo.“ La frua kulturo de la tracoj en la fino de la II kaj la komenco de la jarmiloj estis aparte grava pro la grandegaj monumentoj — la rokaj tombejoj, la „dolmenoj“, malkovritaj ĉefe en la hodiaŭa Sudokcidenta Bulgario kaj Rodopo. De tiu tempo estas ankaŭ la ora trezorejo de Vălcitrân.

Dum la VIII—VI jarcentoj, en la periodo de la greka koloniado, kiam sur la bordoj de Mediteraneo, Egea, Marmora kaj Nigra Maroj — kreigis centoj da urboj-kolonioj, ili fondiĝis ankaŭ sur la bordoj de Tracio. Fakte la grekaj koloniistoj venis plej ofte en jam ekzistantajn traciajn loĝlokojn. Ĉi tie jam estis komencintaj disvolviĝi urboj, kiuj havis malnovajn nomojn: Masambria (la nuna Nesebar), Odesos (Varna) kaj aliaj kiel Apolonio (la nuna Sozopol), Bizone (Kavarna), Dionisopolo (Balĉik), Anfilio (Pomorie). Tie ĉi disvastiĝis la antikva

kulturo, kemenciĝis viglaj interrilatoj kun la traca loĝantaro, oni kreis novajn monumentojn de la antikva skulptarto, kelkaj el kiuj, ekzemple la kelkmetra bronza statuo de Apolono en Apolonio, apartenanta al la elstara dum la V jc. atena skulptisto Kalamik, havis internacian famon.

Dum la unua duono de la V jc. la odrisoj, unu el la plej konataj kaj plej progresintaj en soci-ekonomia rilato traca tribo, sukcesis fondi potencon ŝtatan unuiĝon faman kiel odrisa regno. Paralele kun la helenaj „polisoj“ (urboj-ŝtatoj) kaj la romia respubliko ĝi estas unu el la plej malnovaj ŝtataj organizoj en Eŭropo. „La odrisa regno — rakontas la granda atena historiisto de la V jc. Tukidid — etendiĝis paralele al la maro de urbo Abdera al Evksinoponto (Nigra Maro) ĝis la enfluejo de Istr (Danubo). . . Interne en la lando la distanco de Bizantion (Konstantinopolo) ĝis rivero Strimon (nuna Struma), kie estas la plej malproksima punkto disde la maro, povas esti traŭrita de bona piedmarŝanto por 13 tagoj. La impostoj de ĉiuj barbaraj triboj kaj de la grekaj urboj, regataj de la odrisoj en la tempo de Sevt, kiu reĝis post Sitalk kaj pleje altigis la impostojn, atingis 400 talantojn kaj oni ilin pagis per oro kaj argento. . . El la ŝtatoj de Eŭropo, kiuj troviĝas inter Jonia Golfo kaj Evksinoponto, tiu regno estis la plej granda rilate siajn enspezojn kaj aliajn riĉaĵojn“.

Dum la V—IV jc. la odrisa regno ludis tre aktivan rolon en la politika historio de la Balkanoj, enmiksiĝis en la interrilatojn de Ateno, Sparto, antikva Makedonio. La tiamaĵ historiistoj lasis multajn informojn pri la bonege organizita armeo de la tracoj, pri ties ŝtata organizo, pri la politikaj eventoj, en kiujn enmiksiĝis la tracoj. Tio estas la tempo de plej granda disfloro de la traca kulturo kaj arto. Kreigis notindaj monumentoj, inter kiuj apartan lokon okupas la grandaj kupolhavaĵoj tombejoj — la lastaj loĝejoj de la traciaj reĝoj. Plej bone konservita kaj tutece kovrita de murpentraĵoj estas la fama tombejo de Kazanlık (el la komenco de la II jc. de n. e.). La plej bonaj verjoj de la tiutempa traca toreŭtiko² estas la jam konataj ora-

ALEKSANDRO VUTIMSKI

BULGARIO

Ĉielo via — blua, ege alta,
la tero via — suna kaj kvietaj.
Nun mi vakontos, kiel mi kapablas,
al vi senbruan verskonfeson milan.

Mi amas vin kaj la legendojn viajn,
la laŭdan kanton pri Marko Kralevlki.
Al mi kavernoj viaj memorigas
pri la miraktoj de Sankta Ivano.

Fontanojn amas mi el ŝton' larilajn
kun la surskriboj de iamaj bonfarantoj,
kiuj el Eruzelema malproksima
donacojn siajn kun respekt' alportis.

Mi amas viajn monaĥejojn buntkolorajn
kaj ties kapelitojn belaspektajn
kun paligintaj freskoj kaj altaroj,
kreitaj de ikonpentrist' iama.

La Ĉarpentarojn viajn, la kaptukojn buntajn
kaj la broditajn orluden vestojn,
la lignokruĉojn kaj la brujajn festojn,
kun kiuj oni min koncipis kaj kreskigis.

Maljuna mia, bela Bulgario,
sub via ora, sorĉa firmament'
en la krepusk' mi kiel infano spiras,
dormanta en malnova kara hejmo.

El la bulgara: Prodan Prodanov

AL MIA ESTONTA FILO

Vin mi ne konas —
nur miraĝo estas vi ankoraŭ.
Sed en sonĝoj
kaj en revoj miaj
vin mi vidas
ĉiam.
La voĉeton eĉ ne aŭdis mi,
sed
kiel muziko ĝi karesos min.
La manetojn mi ankoraŭ ne tuŝadis —
ĥo, kiel la unua neĝo delikataj
estis ili.
Mi
ankoraŭ vin ne konas. . .
Sed via am' unua estos mi.
Kaj
pri tio
certa estas mi!

TOEOR ŜOŠEV

DU SOLECAJ KORJOJ

Post tag' somera ĉarma hor' vespera.
Mi — sola sur la bordo mara.
Blövetas vento. Jen turmenta sento.
Ho ve! Forestas mia kara!

Ondetas maro, flustras la arbaro.
Mi — daŭre sola sur la bordo.
En mia koro kreskas la doloro.
La revoj flugas al la Nordo. . .

Kaj tie fore, amvundita kore
suferas etulino mia:
sopiras sola, sola senkonsola! . . .

En rememoroj du solecaj korjoj,
tre fore unu de alia,
en ĉi vespero ĝemas sen espero. . .

kaj argentej trezoroj: ornamajoj de la homa korpo, partoj de ĉevala jungilaro, servicoj por manĝi kaj trinki, trovitaj apud Letnica, Lukovit, Vraca, Panagjuriste, Brezovo k.a. La fama ekspozicio „Monumentoj de la traca arto“, kiu dum la lastaj sep jaroj ĉirkaŭiris pli ol 15 landojn, prezentas ĉion plej bonan el la traca arto kaj unufoje donas plej ĝustan imagon pri la kreaĵoj de la tracoj.

Post longaj bataloj, kiuj daŭris preskaŭ du jarcentojn, la romianoj sukcesis subigi la tracojn (en la 45a jaro de n. e.), kaj la nuna teritorio de nia lando formis kekajn provincojn: Tracio, Supra kaj Malsupra Mizioj. Tiuj provincoj estigis partoj de la romia ekonomia kaj ŝtata sistemo tiam, kiam ĝi estis en sia apogeo de la sklavposeda sociordo. La plej grava esprimo de la ŝanĝitaj sociaj kaj ekonomiaj kondiĉoj estis la evoluo de la urba vivo. La bulgaraj regionoj dum la tempo de la romia regado transformiĝis en grandajn centrojn inter la orientaj kaj okcidentaj provincoj, de ties ko-

merceaj ligoj, de reciproka influo inter diversaj kulturoj. Inter la pli gravaj kaj grandaj urboj, kies restaĵoj ankoraŭ nun memorigas pri la iama disfloro, estis Serdika (nun Sofio), Filipopolis (Plovdiv), Augusta Trajana — Beroe (Stara Zagora), Pautalia (Kjustendil), Eski (Gigen), Nove (apud Svisŝov), Odesos (Varna), Dorostorum (Silistra), Raciaria (v. Arĉar), Abritus (Razgrad), Nikopolis ad Istrum (apud v. Nikjup) ka.

En la lastaj jarcentoj de la historio de la bulgaraj regionoj (IV—VI), post administraj kaj aliaj reformoj en la ŝtato, tiuj regionoj unuiĝis en la diocezo Trakio. Tiu diocezo fariĝis komerceregiono de la nova ĉefurbo Konstantinopolo. Dum la IV jc. niaj regionoj estis centro de tre gravaj eventoj, de kiuj dependis la sorto de la Orienta Romia Imperio. Plifortiĝis la invadoj de diversaj triboj el la nordo, el kiuj la gotoj kaj hunoj faris verajn dezertigojn. Aperis gravaj etnaj ŝanĝoj en la loka loĝantaro, diferencoj por la hodiaŭaj

Norda kaj Suda Bulgarioj. En tiuj regionoj la malnova traca loĝantaro konserviĝis kaj pri ĝi multe parolas la skribaj dokumentoj el la VI jc. Aliloke granda parto de tiu loĝantaro, romanigita kaj helenigita, estis asimilita de la novaj barbaraj triboj, kiuj invadis la landon kaj daŭre restis en ĝi. La bone fortikigitaj urboj plej ofte eltenis la barbarajn invadojn, sed ĝenerale en la interno de la lando oni vidas grandan ekonomian regreson.

En tiuj cirkonstancoj komenciĝis ankoraŭ la grandaj invadoj de la slavoj kaj prabulgaroj, kiuj dum la VII jc. ŝanĝis la etnan kaj socian aspekton de la Balkanoj. Kreiĝis favoraj kondiĉoj por fonda de bulgara ŝtato — ŝtato konstruita en regiono kun riĉa jarmila kulturo.

¹ Dolmeno — tombo ĉiufanke kovrita per grandaj ŝtonoj.

² Dekoracia arto — reliefa elaborado de artaĵoj el metalo.

El la bulgara: K. V.

REVENO EL LA TRANSA MONDO

Ne rigardu min tiel mlre kaj misterel!
Ne timul! Ne timu min!

Vi scias, ke mi antaŭ nelonge mortis, ĉu ne? Tio estas vero. Vero estas ankaŭ, ke mi vizitis la transan mondon kaj ke nun mi revenis de tie. Vero estas, pura vero!

Mi konfesas al vi: vere mi mortis kaj mia animo forflugis en la ĉielon. Sed poste ĝi denove revenis al la tero kaj trafis sian lokon en mia korpo. Jes, stranga estas tio, sed vera. . . Se vi deziras kompreni, kiamaniere ĝi okazis, mi petas vin aŭskulti. Mi rakontos ĉion. De la komenco ĝis la fino.

— Foje mi dormis dolĉe kaj havis belegan sonĝon. Subite mia animo vekis min kaj tute neatendite kaj abrupte diris:

— Mi jam decidis.

— Kion vi decidis?

— Mi decidis vin forlasi kaj forflugi al miaj gefratoj en la transa mondo.

— Kial do? Pro kio vi estas malkontenta de mi?

— Pro kio? Kaj vi ankoraŭ demandas? Pli bone vi mem respondu, pro kio mi povus esti kontenta.

Mi sentis min iomete ofendita kaj malkontente respondis:

— Ne parolu tiel, mi petas. Mi tiom da zorgoj havas por via bonfarto.

— Havas! Stultajon vi havas! Mi jam decidis. Sed mi ne estas devigata ekspliki al vi kion ajn. Malamas mi vian magran korpon kaj vian sensencan vivon sur la tero.

La decido de la animo estis definitiva. Mi ne povis plu disuti kaj lasis ĝin agi laŭ sia volo. Ĝi forlasis mian korpon. La korpo estiĝis senviva kaj mia „mi“, kiel diras la filozofoj, ĉesis esti „mi“.

Mia animo, t. e. mi mem, forflugis al la ĉiela foro. Neniu min renkontis, neniu min kondukis — nek anĝelo, nek diablo, nek iu ajn ĉiela estaĵo. La vojo estis pura kaj glata. Mi unusola intuicie trovis la pordegon de Sankta Petro. La sanktulo sidis sur eleganta ora trono. Spite al miaj imagoj li estis sen barbo kaj eĉ io pli — tre juna. La sanktulo tenis en sia mano malgrandan ŝlosileton, similan al tiuj, per kiuj oni iam streĉis turkajn horloĝojn.

Mi salutis lin kornuslingve:

— Dibar dan! (Bonan tagon!)

Kaj li respondis al mi en belsona Esperanto:

— Bonan tagon!

Tio mirigis kaj ĝojigis min kaj mi diris al mi mem: „Esperanto konkeras ne nur la teron, sed ankaŭ la ĉielon!“

Sankta Petro bonvenigis min tre ĝentile

kaj afable proponis al mi velurtegitan seĝon. Kaj jen nova mirigo kaj surprizo: maldekstre de lia brusto ekbrilis verda stelo. . .

Sankta Petro demandis min:

— Nu, diru al mi, estonta ĉiela civitano, de kie vi venas?

— De Kornuslando, — mi respondis.

— Via nomo?

— Ganĉervi Ganĉerver de vilaĝo Kornuskerno.

— Bone. — Li premis ian butoneton dekstre de sia trono kaj tuj ekbrilis bluverda lumo. . . Poste en la aero aperis diverskoloraj flamaj ciferoj. . . Fine sur la muro pentriĝis iaj strangaj oraj signoj kaj inter ili — mia propra vizajo, sub la vizajo — mia nomo Ganĉervi Ganĉerver.

Sankta Petro tre afable kaj intime sciigis al mi:

— Mi akceptas vin en la paradizon. Al la paradizo vi, Ganĉervi, estas destinita.

— Dankon! Mi tre ĝojas, — estis mia respondo.

Ĉar mi konstatis, ke Sankta Petro estas tre afable kaj bonkora persono, mi kuraĝis demandi lin:

— Kion signifas, Sankta Petro, tiu ĉi verda stelo sur via brusto?

— Kion ĝi signifas? Ĉu vi ne scias? Vi ja estas esperantisto, ĉu ne?

— Jes, mi estas esperantisto, — rapide kaj memfide mi respondis.

— Tio estas la insigno de nia oficiala lingvo. Esperanto estas tutĉiela oficiala lingvo. — Li iomete rigardis min kaj aldonis: — En Kornuslando tre bone prosperas la Esperanto-movado, ĉu ne?

— Jes, tio estas vero, la Esperanto-movado en nia lando bonprosperas, — mi ekscitite substrekis, kaj mia ĝojo estiĝis ankoraŭ pli granda, ĉar mi konvinkigis, ke Esperanto vere konkeras jam ne nur la teron, sed ankaŭ la ĉielon.

Do, evidentigis, ke kun Sankta Petro ni estas jam samideanoj, kaj mi denove kuraĝis kontentigi mian scivolemon demandante:

— Mi petas pardonon, Sankta Petro, sed en la tera Sankta Skribo kaj en la preĝejoj oni vin pentras kiel maljunan homon kun blanka barbo. Kaj nun mi vidas, ke vi estas senbarba junulo.

Li ekridis pardoneme kaj diris:

— Jes, jes, tiel estas. Sur la tero oni min imagas maljunulo kun blanka barbo. Sed mi devas surprizi vin kaj ĉiujn civitanojn de la Tero: mi neniam estis maljunulo kaj neniam portis ian ajn barbon. Regi Universon povas nur juna kaj forta homo. . . Kaj koncerne la

barbon. . . mi destinis ĝin al tiuj sur la Tero, kiuj emas paradi kaj fieri.

Sankta Petro meditis iomete kaj ekparolis plue:

— La teraj homoj iufoje havas strangajn imagojn, kiuj ne ĉiam respondas al la realeco. Mi denove dankis al li pri la bonkoraj kaj saĝaj vortoj.

Sankta Petro donis la malgrandan ŝlosileton al sia gardanto — juna simpatia diablo — kaj ordonis al li malfermi la pordegon. De tie aperis blanka anĝelo, kiu kapsigne salutis min. Sankta Petro diris:

— Promenigu la novan ĉielan civitanon tra la paradizo kaj poste aperigu lin antaŭ GRAKOLODOE.

Mi streĉis la orelojn. GRAKOLODOE? Kio ja estas ĝi? Ĉu ne io danĝera?

La anĝelo metis min sur siajn elegantajn flugilojn, kaj ni ekŝvebis super grandaj urboj, ĉielaj ĝardenoj kaj pitoreskaj vidaĵoj.

La anĝelo klarigis al mi ĉion, kion ni vidis. Ĝi parolis en Esperanto.

Nun mi komprenis, pro kio neniu min renkontis, kiam mi flugis al la ĉielo. La anĝeloj, la diabloj kaj ĉiuj ĉielaj civitanoj estis okupataj. La sanktuloj okazigis grandan kunvenon de la Organizaĵo de Unuigintaj Tutĉielaj Nacioj — OUTN. Ili diskutis la problemon pri la universa sekureco kaj amikeco inter ĉiuj ĉielaj vivantoj. La anĝeloj havis balon kun bonfaraj celoj en la novkonstruita Tutĉiela Akademia Teatro por Opero kaj Baletoj — TATOB. La diabloj efektivigis sportan festivalon organizitan de la Tutĉiela Sporta Federacio — TSF. Kaj ĉar la ĉielspaco de la infero ne estis tre oportuna por sportaj celoj, ili luis konvenan ĉielterenon de la paradizo. Oni devas aldoni, ke inter la diabloj, la anĝeloj kaj la sanktuloj estas valida la principo de paca kunekzistado. La diabloj ekzercigis per forkegoj kaj ludis malpezan atletikon.

Ĉio ĉi estis tre interesa por mi, sed mia kara anĝelo rapidis prezenti min al la stranga por mi GRAKOLODOE.

Ni sidigis.

Antaŭ ni estis granda ĉiela domo, super kies enirejo brilis la stranga kaj timiga por mi vorto GRAKOLODOE. Mia anĝelo tuj malaperis ĉien. Nur post kelkaj sekundoj ĝi denove alflugis kaj eniris min en iun ĉambron. Tie estis tablo kovrita per verda ŝtofo. Malantaŭ la tablo sidis kelkaj personoj. La sidanto en la mezo direktis rigardon al mi kaj demandis:

— De kie vi venas?

— De Kornuslando.

— Via nomo?

— Ganĉervi Ganĉerver de vilaĝo Kornuskerbo.

— Vi estas esperantisto, ĉu ne?

— Jes, mi estas esperantisto, — fiere mi respondis.

— Nun okazos ekzameno pri via scipovo de Esperanto.

— Bone, mi estas preta, — memfide mi respondis.

— Nu, diru esperantlingve ion, kion vi scias!

Mi rapide komencis:

— Mi estas esperantisto. Mi fartas bone. Kiel vi fartas? Ĝis revido. Bonan tagon. Bonan matenon. Bonan. . .

— Sufiĉe, sufiĉe, — interrompis min iu el la komisiono.

— Diru ion alian!

Komprenoble, mi estis preta kaj tuj ekparolis plue:

— Pli bone pano sen butero ol kuko sen libero. Paroli estas bone, sed silenti estas pli bone. Kiu ridas, longe vivas. Esperanto estas. . .

— Sufiĉe, sufiĉe, — denove interrompis min la anoj de la Komisiono kaj komencis rigardi unu la alian kaj ridi. . .

La sidanto en la mezo silentigis ilin kaj turnis sin al mi:

— Rakontu al ni, kara samideano, kiamaniere vi veturis de la Tero ĝis la ĉielo.

— Bone, mi estas preta, — estis mia respondo kaj mi komencis rapide paroli kornuslingve. Ili denove interrompis min:

— Ne kornuse, ne! Parolu en Esperanto!

— En Esperanto? — ekmiris mi. — Tiaj aferoj, karaj ĉielaj esperantistoj, ne estas paroleblaj en Esperanto. Certe tion vi ne scias. — Mi eĉ komencis ilin instrui kaj ataki. — Ĉe ni ĉiuj seriozaj problemoj kaj demandoj estas pridiskutataj kornuslingve. En Esperanto povas okazi miskompreno, ĉu ne?

Mi parolis multe kaj rakontis detale pri mia kornuslanda sperto. Antaŭ la kunveno ni salutis nin en Esperanto, sed poste parolas kornuse, la samon ni faras renkontigante sur strato, sur placo, en lernejo, en klubejo. Ke ni multon scias, sed malmulte parolas en Esperanto ktp, ktp. . .

Certe tiu ekzamena komisiono ne aprobis mian sperton kaj denove komencis ridi.

La anĝelo, kiu estis tradukanto, avertis min ĉesigi mian paroladon.

La anoj de la komisiono interkonsiligis kaj la persono, kiu estis en la mezo, verŝajne prezidanto, deklaris:

— Ĉar Ganĉervi Ganĉerver el vilaĝo Kornuskerbo ne scipovas bone la oficialan lingvon Esperanto, la komisiono decidis revenigi lin al Kornuslando por ellerni bone la lingvon.

En tiu momento mi ne vidis, de kie aperis iu nigra diablo kun sigelilo en mano. Ĝi rapide sigelis mian bruston: „Esperanto-ekzameno malsukcesa“.

Tiel tiu danĝera GRAKOLODOE senigis min je la paradizo. . .

(Daŭrigo sur p. 16)

ПРИМЕРЪТ

На стената в класната стая, на най-личното място, има портрет на Димитров. Срещу портрета в три редици са чиновите.

Днес децата пак насядаха по местата си. Но от счупения прозорец подухваше хлад.

Учителката стана, затули дупката с картон, върна се на мястото си и заразказва:

— „... На улицата се събрали момченца. Те се наговорили да играят на война. Разделили се на две групи. Започнали да се боричкат, да викат, а на края се подгонили с камъни. Един камък отхвъркнал — и право в прозореца на отсрещната къща. Стъклото звъннало и се раздробило на парченца, а храбрите войници се пръснали и изпокрили.

Когато от къщата изскочила разсърдената стопанка, сред улицата стояло само едно слабичко чернооко момченце.

— Кой счупи прозореца? — викнала жената.

— Аз! — рекло момченцето и навело застрамено къдравата си глава.

Жената се зачутила на неговата смелост и го попитала:

— Ами ти защо не побягна и не се скри като другарите си?

— Защото мама ме е учила винаги да казвам истината! — отговорило момченцето.

Учителката замълча и загледа децата.

— А за нашия прозорец никой не си призна — обади се едно момиченце.

— Който го е счупил, си мълчи и се крие между нас — добави друго.

— Да, но това е приказка — обади се от края едно синеоко момченце.

— Не, не е приказка — поклати глава учителката. — И момченцето, което така смело си признало грешката, се казвало Георги, Георги Димитров.

— Димитров ли? Георги Димитров?! — питаха в надпревара децата.

— Да — отговори учителката и погледна към портрета на стената. — Нашият учител и вожд, който от малък обичал истината!

Децата замълчаха и се спогледаха. От крайния чин се надигна синеокото момченце и каза:

— Аз счупих прозореца... без да искам!

Когато свършиха часовете и децата си тръгнаха за дома, момченцето се върна от прага, изправи се пред портрета и прошепна:

— Благодаря ти, учителю Димитров, че ме научи да казвам истината.

Elektis kaj tradukis: Marin Băce

LA EKZEMPLO

Sur muro en la klasĉambro, sur la plej elstara loko, pendas portreto de Dimitrov. Kontraŭ la portreto en tri vicoj staras la benkoj.

Hodiaŭ la infanoj denove sidigis sur siajn lokojn. Sed el la rompita fenestro blovetis malvarmeto.

La instruistino ekstaris, kovris la truon per kartono, reiris al sia loko kaj ekrakontis:

— „... Sur la strato kolektigis knabetoj, kaj interkonsentis ludi militon. Ili dividigis je du grupojn, komencis barakti, krei kaj fine ekpelis unu la alian per ŝtonoj. Unu ŝtono deflugis — kaj rekte en la fenestron de la kontraŭa domo. La vitro ektintis kaj dispecigis, kaj la bravaj soldatoj diskuris kaj kaŝis sin.

Kiam el la domo elkuris la kolerigita dommastrino, meze de la strato staris nur unu magra nigraokula knabeto.

— Kiu rompis la fenestron? — voĉis la virino.

— Mi! — diris la knabeto kaj klinis hontiginte sian bukloharan kapon.

La virino ekmiris pri lia kuraĝo kaj demandis:

— Kaj vi, kial vi ne forkuris kaj ne kaŝis vin kiel viaj kamaradoj?

— Ĉar panjo instruis min diri ĉiam la veron! — respondis la knabeto.

La instruistino silentigis kaj ekrigardis la infanojn.

— Sed pri nia fenestro neniu konfesis, — sin aŭdigis iu knabineto.

— Kiu rompis ĝin, silentas kaj kaŝas sin inter ni, — aldonis alia.

— Jes, sed tio estas fabelo, — aŭdigis sin de la rando bluokula knabeto.

— Ne, ne estas fabelo, — skuetis kapon la instruistino. — Kaj la knabeto, kiu tiel kuraĝe konfesis sian eraron, nomiĝis Georgi, Georgi Dimitrov.

— Ĉu Dimitrov? Georgi Dimitrov?! — demandis la infanoj antaŭante unu la alian.

— Jes, — respondis la instruistino kaj alrigardis la portreton sur la muro. — Nia instruanto kaj gvidanto, kiu de sia infanaĝo amis la veron!

La infanoj silentigis kaj ekrigardis unu la alian. De la randa benko levigis la bluokula knabeto kaj diris:

— Mi rompis la vitron... nevole!

Kiam la lernohoroj finiĝis, kaj la infanoj ekmarŝis hejmen, la knabeto revenis de la sojlo, starigis antaŭ la portreto kaj ekflustris:

— Mi dankas vin, instruanto Dimitrov, ke vi instruis min diri la veron!

LA 40a KONGRESO DE BEA EN LA GAZETARO

deziras korespondi

Bulgario

La centra bulgara gazetaro montris kontentigan intereson al la 40a jubilea kongreso de BEA.

La plej influa kaj plej disvastigita en la lando ĵurnalo „Rabotniĉesko delo“, organo de Bulgara Komunista Partio, aperigis (12.7.) grandan artikolon pri la 50a datreveno de la fondo de Bulgara Laborista E-Asocio (BuLEA) de Nano Kjuĉukov, vicprezidanto de BEA. La aŭtoro dediĉas parton de la artikolo al la antaŭstaranta kongreso. La sama ĵurnalo je la 13a kaj 15a de julio informis pri la kongresa laboro.

J. „Zemelisko Zname“, organo de Bulgara Agrarista Popola Unuiĝo (partio), aperigis (15.7.) korespondadon pri la kongreso.

La ĉiutaga junulara ĵurnalo „Narodna Mladej“, organo de CK de Komsomolo, ankaŭ dufoje informis pri la kongreso (13 kaj 14 de julio).

J. „Oteĉestven Front“, organo de Patrolanda Fronto — la plej amasa sociopolitika organizaĵo en Bulgario, aperigis (15.7.) ampleksan korespondadon de sia loka korespondanto Metodi Tanev, en kiu estas informoj ne nur pri la kongresa laboro, sed ankaŭ pri la diversflanka agado de BEA.

La ĉiutaga ĵurnalo „Oteĉestven Glas“ en la kongresurbo Plovdiv sufiĉe frue antaŭ la kongreso komencis aperigi presperantan rubrikon. Speciale pri la kongresaj preparoj ĝi informis la 3an de aprilo. En la tago de la kongresa malfermo (12.7.) la ĵurnalo dediĉis al la kongreso preskaŭ tutan paĝon kun salutologo en E-o. La paĝo enhavas artikolon de Hr. Gorov, prezidanto de BEA, skizon de Kr. Sofroniev pri E-ploniro Georgi Oreŝkov, fondinto de la loka E-societo, artikolon de Vl. Jelev pri amikaj ligoj inter la e-istoj el la ĝemelaj urboj Plovdiv kaj Lajpcig (GDR), historiajn fotojn, diversajn informojn.

La junulara semajna ĵurnalo „Komsomolska Iskra“ en Plovdiv aperigis (7.7.) intervjuon kun Fani Mihajlova, vicprezidantino de LKK.

J. „Oteĉestven Zov“ (u. Vraca) aperigis (10.6.) prikongresan artikolon de Bojĉo Mladenov kaj postkongresan informon (25.7.).

La distrikta ĵurnalo „Ŝumenska Zarja“ (u. Ŝumen) aperigis (8.7.) artikolon pri la kongreso de Cvjatko Todorov, prezidanto de la loka E-societo „Vekigo“.

La urba ĵurnalo „Ĉepinec“ (u. Velingrad) aperigis (31.7.) intervjuon kun Nguen Duk kaj Dao An-Kha, oficialaj delegitoj de frata Vjetnamio, pri iliaj impresoj de la kongreso.

Do sume 9 bulgaraj ĵurnaloj kaj gazetoj aperigis 23 prikongresajn materialojn.

La radio kaj televido ankaŭ dediĉis atenton al la kongreso. Radio Plovdiv elsendis antaŭ la kongreso 4—5-foje prikongresajn informojn kaj dum la kongresaj tagoj informis po du fojoj tage. Radio Sofia ankaŭ informis regule en la kongresaj tagoj. Bulgara televido 4-foje raportis pri la kongreso per bildoj kaj tekstoj.

En Varna tute subite forlasis niajn vicojn

Dimitro Dimov

aktiva e-isto, multjara kursgvidanto kaj E-poeto.

La 16an de septembro forpasis en sia 79-jara aĝo nia bonega amiko el Grossenhain

Otto Lauckner

multjara peranto de „BE“ en GDR.

Kiel vera germana patrioto kaj komunisto li batalis kontraŭ la hitlera reĝimo, pro kio kelkajn jarojn suferis en koncentrejo. Kiel esperantisto li faris multon por disvastigo de la Internacia Lingvo en GDR, gvidante multnombrajn E-kursojn.

Niajn kondolencojn al la funebrantaj familioj!

Sonja Petkova kaj Georgi Petkov — str. Vasil Drumev, bl. 22, v. II, ap. 15, 5306 Gabrovo, (geedzoj — pri iluziismo kun ĉi)

Ivanka G. Minčeva — v. Pejna — 5370 Drjanovo. Dobrina G. Staneva — str. Bratja Denĉevi 5370 Drjanovo (28-jara, oficistino).

Jordanka M. Popova — 5337 Ganĉevce, Gabrovska (29-jara, oficistino — pri muziko k. a.).

Boris Jordanov — str. A. Jdanov 58, 5370 Drjanovo (12-jara lernanto — pm, bk ka).

Stefka Jordanova Ruseva — kv. Zaharen zavod, dom 13, 7003 Ruse (37-j. konstruteknikistino).

Kunka St. Ivanova — kv. Zaharen zavod, dom 46, 7003 Ruse (30-j. oficistino).

Erineta G. Pavlova (25-j. studentino) kaj Emil M. Pavlov (27-j. studento) — kv. Zaharen zavod, dom 16, 7003 Ruse.

Maria Velikova Ivanova — str. Aleja Vazrajdance 128, v. II, 7004 Ruse (37-j. inĝenierino).

Antoaneta Jordanova Ilieva — 7058 Martin, Rusensko (30-j. flegistino).

Emilia Andreeva — str. Ĥristo Botev 90, 7650 Dulo, Silistrensko (16-j. lernantino).

Tatjana Ilieva Kondova — 7680 Okorŝ, Silistrensko (16-j. lernantino).

Ani Donĉeva — str. Vasko Manolov 112, 2600 Stanke Dimitrov (16-j. lernantino).

Anka Iv. Stojanova — str. Oktomvri 10, 2600 Stanke Dimitrov (20-j. oficistino).

Veneta Guŝterova — 2622 Jahinovo, Kjustendilsko (20-j. instruistino).

Viktoria Georgieva Illova — str. Prespa 5, 2600 Stanke Dimitrov (30-j. poŝtoficistino).

Veska Jord. Igova — str. Neofit Rilski 64, 2600 Stanke Dimitrov (16-j. lernantino).

Violeta Sopka — str. Jordanka Nikolova 2-A, dom 6, v. II, ap. 34, 2600 Stanke Dimitrov (23-j. instruistino).

Zoja J. Gorova — str. Georgi Rakovski 18, kv. Jahinovo, 2600 Stanke Dimitrov (18-j. studentino).

Iskra Ŝojanova kaj Stefan Stojanov — str. Veliĉko Kostov I, v. 4, et. 8, ap. 60 Varna (21-jaraj gestudentoj).

Mihail Cervenkov — st. Sredna gora 6, Veliko Tarnovo (40-j. scienca inĝeniero-agronomo — serioza korespondado pri ĉi kun ĉi, kolektas bk, pm).

(Sekvas sur la 3a kovrilpaĝo)

(el paĝo 14)

Certe vi volas ekscii, kion signifas GRA-KOLODOE? Jen kion ĝi signifas: Granda Komitato por Lingvaj Demandoj de Esperanto. (GRA-KO-LO-DO-E).

Tiel okazis la tuta afero pri mia reveno de la transa mondo.

Nun mi enlistigis min en kurso por komencantoj kaj eklernis Esperanton konscie kaj obstine — per gramatiko, ekzercado, skribado kaj parolado. Nun mi kredas, ke oni akceptos min en la paradizon sen obtakoj, ĉar mi sciopos bone la lingvon. Krom tio... ja Sankta Petro jam estas mia amiko...

Galina Gospodinova — str. Ivan Bogorov 9, v. 4, ap. 39, 9000 Varna (20-jara).

Kalina Konstantinova — str. Asen Halačev 71, 4004 Plovdiv (17-j. — muziko, literaturo, lingvoj).

Mariana G. Gateva — 4199 Trud, Plovdivsko (20-j. — pri fiziko, matematiko, literaturo ka.).

Nikola Nikolov — str. Capaev 2, v. III, ap. 9, 1113 Sofio (serĉas kaj interŝanĝas ŝercajn kaj satirajn poŝtkartojn kun la celo aranĝi ekspozicion kaj propagandi E-on dum festivalo de humuro: rekompenco certa).

Hungario

Zonai Jozsef — Kiskunhalas, Allomas n. 2, H-6400 (40-j. ingeniero — vojaĝoj, reciproka gastado; lia edzino — ankaŭ estas e-istino; la adreso validas ankaŭ por liaj gekursanoj, inter 20-40-jaraj, kiuj tre ŝatus havi amikojn en Bulgario).

Bekesi Csilla — Gyoma, Kossuth ŭt. 13, H-5500, (20-j., studentino en Budapeŝta Teknika Universitato — kun bulgaraj gejunuloj).

Johano Konec — Kóka Petőfi ŭt. 4, H-2243 (20-j. — kun bulgaraj gejunuloj — muziko, arto, historio)

Pollando

Mieczysław Porowski — ul. Dambonia 133/15, 45-774 Opole (35-j. — muziko, turismo, sporto, pm, bk, gr. diskaj).

Valdemar Marcinkowski — str. Polna 1/B, 67-115 Bytom Odrzanski (junulo — kun gejunuloj pri moto-sporto, bk, pm, ka.).

Zygmunt Chojnacki — ul. Gagarina 12/m. 42, 93-509 Łódź (26-j., muziko, sporto).

Junaj gee-istoj, skribu al Esperanto-klubo ĉe Zespół Szkół Zawodowych n-ro 5, ul. Tkacka 11, 97-200 Tomaszów Maz.

Rumanio

Dinku Mihai-Julian — P. O. B. 3093, 71400 București 30 19-j. — bk, esperantaĵoj, turismo, sporto).

Sovetunio

Ivan K. Kiriluk — str. Puŝkinskaja (16-5, 281900 Kamenec-Podolskij, Hmelnickaja obl. (54-j. — elektisto).

Ludmila Borejko — pos. Ĉemzavoda 6-51, 281900 Kamenec-Podolskij, Hmelnickaja obl. (35-j. ilegistino).

Kolesnikov Leonid — pereulok Samborskij 11/1, Dragobić 253 720 USSR (18-j. lernanto — literaturo, sporto).

Linnik Svetlana — Lvov-Glavpoŝta a/ĵa 108, Sovetunio — 290 000 (27-j. instruistino — artiliteraturo, libroj).

Nataŝa Kirilenko — ul. Komunalnaja 2-5a, Jalta, Sovetunio 334 200 (17-j. — stereo, insignoj ka.). Levickij Roman — prospekt VLKSM 62/13, Lvov-45, 290 045 Sovetunio (22-j. studento — biologio, belarta literaturo).

Silin Sergej — ul. Sverdlova 75-49, Jalta, Sovetunio — 334 200 (17-j. — sporto, insignoj ka.).

Teknikisto 40-jara serĉas librojn pri flagoj, blazonoj, tipografio, eldonaferoj. Proponu al: Nikolaj Starodubcev — ab. keso 618, Doneck, Sovetunio — 340 092.

Galceva Galina — do vstrebovanija, 450 083 Ufa-83 (instruistino — kun bulgaroj).

Savinov Aleksandr — ul. Jeleznodoroĵnaja 6a, ĉambro 236, 330 002 Zaporozje-2 (25-j. studento). Jigalceva Ljudmila — ul. Liŝačov 21-55, 456 319 Miass (18-j., studentino).

Nikolaeva Natalia — ul. Orlovskaja 1-20, 456 304 Miass-4 (25-j. laboristino).

Sašina Natalia — ul. 8 de Marto 177-11, 456 317 Miass — 17 (19-j. oficistino).

Zaripova Raisa — ul. Lev Tolstoj 82, 456 315 Miass — 15 (23-j. kudristino).

Jakina Anna — ul. Nahimova 24-7, 456 313 Miass — 13 (24-j. farmaciistino).

Carin Vladimir — poŝtkeso 933, 252 087 Kjev-87 (27-j. ingeniero).

Verdaĵ steloj

EN LA ĈI-JARA INFANA KONGRESETO

Hieraŭ mi ricevis leteron de mia norvega amikino Marianne. Ĝi revenigis min al la gajaj tagoj dum la ĉi-jara Infana Kongreseto.

La 18a Infana Esperanto-Kongreseto okazis de la 2a ĝis la 9a de aŭgusto en Elvskogen, 30 km de Stokholmo (Svedio). La kongresejo troviĝis meze de bela konifera arbaro. En ĝi ĉirkaŭ 30 infanoj el diversaj landoj dum unu semajno manifestis sian amikecon, pasigante la tempon en ludoj, kulturaj kaj lingvaj okupoj, sporto k.a.

Tuj, kiam ni alvenis, oni kroĉis sur niajn brustojn belajn kongresinsignojn, sur kiuj estis pentritaj la standardo de la koncerna lando, ties nomo kaj nia propra nomo. Inter ni troviĝis ankaŭ malgrandaj infanoj (4-5-jaraj). Iu finnino eĉ ploris disigante kun la patrino. Poste ŝi plej multe gajis kaj ridis. Mi konfesis, ke la ekveturo ankaŭ por mi estis iom trista. Mi estis sola bulgarino kaj tute ne sciis, kiel mi kunvivus tie. Sed baldaŭ ni amikiĝis, kaj la tempo pasis tre interese kaj amuze.

La programo estis varia. Ni faris belajn promenadojn en la freŝa norda arbaro, kie ni kolektis multajn berojn. Ĉiuj tre ŝatis bani sin en saŭno, en kiu la temperaturo estis ne kutime alta por ni. En la saŭno estas tri sidplatoj kun diversa alto — ju pli alte, des pli varme. Satata okupo estis la naĝado en baseno. Ni plenumis diversajn ludojn. Mi ŝatis ludi surtablan tenison. Nin vizitis blinda esperantisto, kiu rakontis, kiel la blinduloj skribas kaj legas, kaj montris al ni dikan libron por blinduloj. Ni rigardis interesan E-filmon, lernis novajn kantojn kaj ludojn. En la libera tempo ni legis. Iun tagon ni vizitis muzeon en Stokholmo.

La manĝoj estis bonaj, tamen por tagmanĝo oni donis kuiritajn terpomojn anstataŭ pano, kio al mi ne plaĉis. Iun vesperon ni rostitis vurstojn en fajro, bruligita en la korto. La vurstoj estiĝis tre bongustaj. Ĉiuvespere ĉiu skribis taglibron pri siaj travivaĵoj.

En mia ĉambro mi loĝis kun Marianne el Norvegio kaj Marija el Jugoslavio — la unua estas pli granda, la dua — kiel mi. Ĉe enlitiĝo ĉiu el ni diradis en Esperanto kaj en sia nacia lingvo „Bonan nokton!”

Tio estis sep neforgeseblaj tagoj. Plimultiĝis miaj internaciaj amikecoj. Mi opinias, ke tiuj travivaĵoj restos en mia memoro tutan vivon.

ABONU ESPERANTO-PERIODAĴOJN!

„PACO“

organo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM)

prezentas tribunan de la porpacaj streboj de l'esperantistaro, informas pri ties pacarangoj kaj pri la batalo kontraŭ la militminaco en la mondo.

Krom tiuj bazaj materialoj vin ĝuigas:

- lingvaj temoj de plej elstaraj lingvistoj kaj esperantologoj de la internacia E-movado;
- poezio kaj belestro de la monda literaturo;
- impresoj de idversaj landoj, priskriboj pri problemoj de batalantaj popoloj (Vjetnamio, Kampučio, Kubo k. a.);
- karikaturaj, distraĵoj, adresoj de korespondemuloj — ĉio sur luksa grandformata papero kun ilustraĵoj.

„PACO“ aperas nun en Bulgario, kio estas tre favora por la bulgaraj e-istoj, ĉar: 1) ĝi estas unu el la plej malmultekostaj popularaj internaciaj E-gazetoj;

2) ĉiu povas aboni ĝin en iu ajn poŝtejo — en la katalogo ĝia titolo troviĝas sur paĝo 19 kaj havas numeron 0639. Jarabono — 3 levoĵ.

La societaj estraroj kune kun la varbado de abonantoj por „Bulgara Esperantisto“ varbu ankaŭ por „PACO“ — unu el la plej leĝindaj internaciaj E-revuoj!

„KOLEKTANTO“

„Kolektanto“ estas revuo de la kolektantoj ĉe BEA. Krom artikoloj pri la kolektado kaj la kolektantoj ĝi aperigas artikolojn pri lingvaj demandoj, pri filatelo, filokartio, faleristiko k. a., pri pentroarto kaj fotoarto, pri la ŝatantoj de libroj, ankaŭ versaĵojn, kantojn, proverbojn, ekslibrisojn, vortenigmajn, adresojn de korespondemuloj k. a.

La revuo estas ilustrita. Simplaj kaj interesaj legaĵoj faras ĝin taŭga por E-kursoj kaj precipe por komencantoj.

La revuo havas legantojn en 70 landoj, kiuj bone pritaksas ĝin.

La revuo povas esti bona donaco por eksterlandaj korespondantoj, ĉar multaj el ili ne havas eblecon aboni ĝin pro diversaj kaŭzoj. „Kolektanto“ aperas 4-foje dum la jaro.

La jarabono estas 1.50 levoĵ. Por eksterlando — 3 levoĵ (3 dolaroj aŭ egalvaloro, aŭ 12 respondkuponoj). Oni preferas kolektivajn abonojn.

Bonaj helpantoj povas esti perantoj: por 15 abonoj la peranto ricevas unu jarabonon senpage. Kiu abonos la revuon por 1980 kaj 1981 jaroj, ricevos senpage la numerojn de 1979 j.

Adrespor abono: Sofio 1000, str. „A. Ĵdanov“ 5, DSK — Dimitrovski rajon 185/3081 — por „Kolektanto“.

Leterojn kaj materialojn sendu al: Sofio 1303, bul. „Hr. Botev“ 97, „Kolektanto“.

ĈU VI HAVAS BONAN IMAGON?

1. Ĉu la horloĝo montras la naŭan horon aŭ dekduan kaj kvaronon?
2. Ĉu la tableto estas ronda aŭ kvadrata?
3. Ĉu la ŝuo estas dekstra aŭ maldekstra?
4. Ĉu la skatolo kun la kvadratetoj estas por ŝako aŭ ne?
5. Kiu el la kuleroj estas pli malpeza?

Al unu el la sukcese respondintaj la redakcio donos premion. Bone motivigu viajn respondojn per kelkaj frazoj.

Solvo de la vortenigmo en n-ro 4

Kiŝinev. Vilnius. Alma Ata. Minsk. Baku. Aĥabad. Duŝanbe. Tallin. Kiev. Erevan. Moskvo. Frunze. Tbilisi. Riga. Taŝkent.

La ŝtato: Sovetunio.

La nomo: Vladimir Iliĉ Lenin.

La naskiĝurbo: Simbirsk.

La dato: 22 aprilo 1870.

Plej bonan solvon sendis k-do Atanas Gaev el Asenovgrad.

